

Monato

INTERNACIA MAGAZINO SENDEPENDA

44a jarkolekto, aprilo 2023/04



הקיסר מקי
מבצע

אנחנו האנרכיסטים
של חורף 2023



לנפס
יורחז

Israelo protestas

Kial ne ĉiu subtenas Ukrainion?

Leteroj el Kongo sub milito



En tiu ĉi numero

FOTO DE LA KOVRILLO: AVIVI AHARON / SHUTTERSTOCK.COM

Monato

INTERNACIA MAGAZINO SENDEPENDA

www.monato.be

MONATO, internacia magazino sendependa pri politiko, ekonomio kaj kulturo en la internacia lingvo Esperanto; fondinto: Stefan Maul; 44a jar-kolekto; aperas principe la 15an de la antaŭa monato, escepte de aŭgusto.

MONATO havas 159 korespondantojn kun kunlaborkontrakto en 47 landoj kaj abonantojn en 64 landoj; aperas nur originale en Esperanto verkitaj artikoloj (ne tradukoj); represo kaj traduko el MONATO nur kun indiko de la fonto; MONATO estas eldonata en tradicia papera versio kaj bite en la formoj PDF, ePub, Kindle kaj en voĉlegita versio; la enhavo de la artikoloj ne nepre kongruas kun la opinio de la eldonejo.

🌐 el diplomatia vidpunkto

RUSA INVADO 3

➤ Kial la subteno por Ukrainio ne estas ĉiea?

🏠 politiko

D. R. KONGO 6

➤ Militaj tagoj vide de interne

ISRAELO 9

➤ Ŝtormo pro reformo

VENEZUELO/GUJANO 11

➤ Historia disputo

✈ moderna vivo

LUDOJ 13

➤ Nova modo plivastiĝas

MIGRADO 16

➤ Fuĝantoj bonvenaj kaj ne bonvenaj

AŬSTRIO 18

➤ Omaĝo al la svedo Arne Karlsson

🌿 scienco

SATELITOJ 20

➤ Venezuelo kaj Ĉinio kunlaboris

AKTUALE 21

➤ Aviadilaj 5G-aparatoj:
novaĵoj por eŭropaj vojaĝantoj

🌍 medio

SEKECO 23

➤ Klimatŝanĝiĝo kaj incendioj detruis sudan Ĉilion

NATURFENOMENOJ 25

➤ Ĉu la plej granda akvofalo estas submara?

📖 eseo

NATURO 26

➤ Fascino de etaj insuloj

🗣 lingvo

OPINIO 28

➤ La hispana en Ameriko:
apartaĵoj, unikeco, identeco

📚 libroj

➤ Jen antologia omaĝo! 30

eldonejo:

Vlaamse Esperantobond v.z.w.
(Flandra Esperanto-Ligo),
Lange Beeldekensstraat 169,
B-2060 Antwerpen, Belgio;
telefono: + 32 3 234 34 00;
retpoŝto: eldonejo@monato.be;
Skype: fel-monato;
BE0419 028 122 -
RPR Antwerpen.

abontarifo:

La abontarifo varias laŭlande.
Vd. en MONATO 2022/11, p. 32
kaj en monato.be/tarifo.php
aŭ petu ĝin de
eldonejo@monato.be.

retejo: www.monato.be



socialj retejoj:

- 🐦 Twitter: @RevuMonato
- 📘 Facebook: facebook.com/revuo.Monato/
- 📧 Telegramo: monato.telegramo.org
- 📺 Youtube: www.monato.be/jutubo
- 🗨 Mastodon: @monato@esperanto.masto.host
- 📷 Instagram: RevuoMonato

honora ĉefredaktoro:

Stefan Maul.

ĉefredaktoro:

Paŭl Peeraerts.

reviziantoj:

Edmund Grimley Evans,
Jens S. Larsen, Rob Moerbeek,
Brian Moon, Fransoazo Noireau,
Manolo Parra, Andrej Peĉenkin,
Anna kaj Mati Pentus, Remuŝ,
Antônio W. de Ruijter.

faktokontrolanto:

André Ruyschaert

redakcia sekretario:

Paŭl Peeraerts.
Rete: redakcio@monato.be.

grafiko:

Zep Armentano, Ferriol Macip

redaktoroj:

- **Arto:** Aleksej Salomatov, Moskvo, arto@monato.be.
- **Ekonomio:** Roland Rotsaert, Belgio, ekonomio@monato.be.
- **Eseoj:** Sendu al la koncerna redaktoro, depende de la temo.
- **Historio:** Trevor Steele, Aŭstralio, historio@monato.be.
- **Hobio:** Evgeni Georgiev, Aŭstrio, hobio@monato.be.
- **Komputado:** Edmund Grimley Evans, Britio, komputado@monato.be.
- **Leteroj:** Paŭl Peeraerts, Belgio, leteroj@monato.be.
- **Libroj:** libroj@monato.be.

Noto: Librorecenzojn oni ne sendu al la redaktoro propriniciate. La kunlaborantoj ricevos la recenzopetojn kaj la librojn de la eldonejo.

- **Lingvo:** Roberto Pigo, Kipro, lingvo@monato.be.
- **Literaturo:** Trevor Steele, Aŭstralio, literaturo@monato.be.
- **Medio:** medio@monato.be.
- **Moderna vivo:** Norberto Díaz Guevara, Kubo, moderna_vivo@monato.be.
- **Politiko:** Massimo Ripani, Italio, politiko@monato.be.
- **Scienco:** Roberto Pigo, Kipro, scienco@monato.be.
- **Spirita vivo:** Alberto García Fumero, Kubo, spirita_vivo@monato.be.
- **Turismo:** Evgeni Georgiev, Aŭstrio, turismo@monato.be.

RUSA INVADO

Kial la subteno por Ukrainio ne estas ĉiea?



Michał ŁABENDA



OPEN ART / SHUTTERSTOCK.COM

La 24a de februaro 2022 ŝanĝis la aktualan historion. Rusio, konstanta membro de la Sekureca Konsilio de la Sekureca Konsilio de Unuiĝintaj Nacioj (UN), garantianto de la ukraina sendependeco laŭ la Budapeŝta Interkonsento de la jaro 1994, ŝtato kun la plej granda nuklea arsenalo en la tuta mondo, atakis la najbaran Ukrainion. Per modernaj amaskomunikiloj ĉiuj povis informiĝi preskaŭ en reala tempo pri la aktivado de la rusa armeo. Ĝi ĝis nun bombardas ukrainajn urbojn, faras preskaŭ malkaŝe militkrimojn, detruas pontojn, transportvojojn, elektrocentralojn ktp.

Voĉdono pri kondamno de la rusia agreso okazis en la Ĝenerala Asembleo de UN pasintjare, la 2an de marto. Rezultoj estis tre klaraj: 141 landoj jesis kaj nur 5 landoj – Rusio, Belorusio, Eritreo, Nord-Koreio kaj Sirio – kontraŭis. 35 landoj sindetenis. Sindeteno okazas ofte dum UN-aj voĉdonoj, sed neniam senkiale. En tiu ĉi afero gravas, ke por kelkaj landoj Rusio estas gravega ekonomia partnero, nekomparebla kun Ukrainio. En aliaj regionoj Rusio per armiloj kaj servoj de la fifama militgrupo *Wagner* subtenas lokajn malfortajn registarojn, kiuj ofte kaptis la potencon per puĉoj aŭ ribeloj; nur per rusa helpo ili povas fortiĝi kaj batali kontraŭ aliaj lokaj politikaj fortoj.



En multaj afrikaj landoj oftigas voĉoj pri la rusia rajto por memdefendo kontraŭ supozeble preparata atako de NATO-landoj, pri la malamika, raba kaj malestima okcidenta politiko en la tuta mondo ktp.

Dume demokratia Mongolio senelekte devas vivi inter du enormaj najbaroj – la plej grava mongola vivintereso estas do pacaj rilatoj kun Ĉinio kaj Rusio. Por Ĉinio, konstanta membro de la Konsilio, ĉiu voĉdono estas rezulto de multaj mondaj kaj regionaj konsideroj, de ĝiaj pasintaj kaj antaŭvidataj pozicioj pri multaj aferoj.

Dum la voĉdonoj en UN ankaŭ neĉeesto estas signifa, kaj kelkaj landoj, inter kiuj estas tre proksimaj rusaj aliancanoj, uzis tiun ĉi eblecon por montri sian propran opinionon.

Diversaj opinioj

Post unu militjaro estas forta opinio en Okcidento, ke la rusia kulpo estas klara kaj senduba. Kontraŭe, en multaj afrikaj landoj oft-

iĝas voĉoj pri la rusia rajto por memdefendo kontraŭ supozeble preparata atako de NATO-landoj, pri la malamika, raba kaj malestima okcidenta politiko en la tuta mondo ktp. Sergej Lavrov, la rusa ministro pri eksteraj aferoj, estas bona en diversaj landoj, li vizitis ŝtatojn, kien li en aliaj cirkonstancoj neniam alvenus. Tio ne okazas senbaze. Kiuj estas do la kialoj de tiu ĉi simpatio por la okupanto kaj atakanto?

Okcidenta superregado

En Afriko estas tre disvastiĝinta la ideo pri okcidenta superregado, aŭ hegemonio, el kiu fontas la plimulto de la plej gravaj nunaj problemoj en Afriko kaj Mez-Oriento. Laŭ tiu ĉi konvinko, kune kun la kolapso de Sovetunio finiĝis la ekvilibra mondordo. Ne plu kontraŭstarata de iu ajn forto en Afriko, Usono povas agi laŭ sia volo kaj kaprico. Vaŝingtono konsideras aliajn landojn kiel malpli gravajn partnerojn, aŭ eĉ kiel uzablajn ilojn por atingi siajn celojn – ĉu en Afriko, ĉu en Azio, ĉu en Eŭropo. Laŭ tia ĉi teorio, Putin antaŭvidis la usonajn planojn kaj kontraŭagis. Sekve, la rusa milito ne estas pri Ukrainio, la vera rusa celo estas rekonstruado de la jam detruita, pli justa mondordo, kie afrikaj kaj aziaj landoj havos eblon elekti partnerojn kaj kunlabori kun ili, sur bazo de siaj propraj interesoj.

Rezultoj de la koloniaj spertoj

La koloniaj spertoj estas malsamaj en la diversaj regionoj. En Mez-Oriento la plej gravaj malamikoj estas kompreneble Usono kaj ĝia aliancano Israelo. En la okcidenta parto de Afriko daŭre fortiĝas sentoj kontraŭ Francio. Lokaj politikaj elitoj, ofte edukitaj en francaj universitatoj, kulpigas la antaŭan kolonian ŝtaton ne nur pri la malnovaj pekoj, sed ankaŭ pri siaj propraj malsukcesoj de lastaj jardekoj. Sekvante sukcesan multjaran rusan propagandon, afrikanoj konsideras Rusion forta lando sen kolonia pasinteco, kiu pretas subteni partnerojn el aliaj kontinentoj. Rusio, oni pensas, estas ankaŭ pli efika en siaj agoj. La lasta opinio fariĝis precipe forta fone de la plurjardeka malsukcesa franca interveno en Sahelo.

Ankaŭ tutafrikistoj, kiuj sonĝas pri estonta unuiĝinta, riĉa kaj influa Afriko, esperas, ke Rusio fariĝos amika forto subtenanta afrikajn landojn kontraŭ la antaŭaj koloniistoj. Ili agas laŭ la regulo „Malamiko de mia malamiko estas mia amiko.”

Senluziigo pri demokratio

En la afrika regiono nur kelkaj gvidantoj simpatias demokratiajn valorojn. Multaj ĉefministroj kaj prezidantoj, plej multe

”

Arabaj landoj tre facile kredas konspirteorion pri preparata atako fare de NATO-landoj kontraŭ Rusio el Ukrainio

”

La grava afero por kompreni afrikan akceptadon de la rusa propagando estas la historia rolo de Sovetio en la sesdekaj kaj sepdekaj jaroj, post kiam multaj afrikaj landoj atingis sendependecon

”

Nun rusaj ĵurnalistoj, publicistoj kaj politikistoj ripetas senpaŭze kaj memfide, ke la politika vivo en Ukrainio estas tute trempita en naciismo kaj militismo, ke prezidanto Zelenski estas drogulo, psika malsanulo, pagata de Usono, ke Ukrainio kaj NATO celis ataki kaj diserigi Rusion

eksaj soldatoj de diversaj rangoj, atingis siajn potencajn poziciojn aŭ konservis ilin nur per rusa subteno – armiloj, militrupoj, trejnistoj, konsilistoj. Kompreneble, ili neniam akceptos okcidentan retorikon pri demokratiaj rajtoj, jura regado kaj internaciaj normoj. Kontraŭe, tiuj eksaj soldatoj ĉiam sekvos tion, kion diros Rusio, subtenos rusan politikon kaj kredos je rusiaj argumentoj.

Tamen ne nur politikaj elitoj esprimas disreviĝon kaj senluziigon pri demokratio, kiu dum la lastaj jardekoj ne solvis lokajn ekonomiajn kaj sociajn problemojn. Pli kaj pli da homoj kredas, ke nur aŭtoritata registaro povos atingi florantan ekonomion kaj plenan sendependecon – do, Rusio, almenaŭ laŭ la bildo prezentata en ĝia propra propagando, estas la plej bona pruvo de tiu ĉi espero.

Arabaj landoj

Ankaŭ en la arabaj landoj la kunteksto estas tre kompleksa. Multaj lokaj politikaj altranguloj kredas, ke la protestoj de la t.n. Araba Printempo estis sekrete planitaj kaj organizitaj en Okcidento, kiu celis al profunda reordigo de la tuta mez-orienta regiono laŭ siaj propraj interesoj. Arabaj landoj tre facile kredas konspirteorion pri preparata atako fare de NATO-landoj kontraŭ Rusio el Ukrainio. Aliflanke, multaj partoprenantoj de

la protestoj dum la Araba Printempo demandas sin, kial iliaj landoj devus subteni la ukrainojn, se neniu subtenis la demokratiajn movadojn kaj manifestaciojn, kiujn lokaj potenculoj tiel forte subprem.

Eŭropaj duoblaj normoj

Dum la unuaj tagoj de la milito en Ukrainio novaĵagentejoj raportis pri la problemoj de studentoj kun malhela haŭto forkurantaj de la milito. Ĉie en gazetoj kaj televidaj programoj aperis bildoj de junaj afrikanoj kaj azianoj, batitaj, prirabitaj, senespere atendantaj eblon transiri la ŝtatlimon, dum limgardistoj servas ĉiujn blankulojn. Ne gravas, ke la raportoj estis ege troigitaj, la mesaĝo estis bone komprenita – eĉ dum la plej grava socia krizo eŭropanoj havas duoblajn normojn. En multaj afrikaj landoj oni demandis: Kial ni devus esti solidara kun homoj, kiuj ne helpis niajn geknabojn dum la malfacila tempo?

En islamaj landoj oni starigas demandon pri duoblaj normoj en alia kunteksto. Kial la milito en Ukrainio estas pli grava ol la okupado de Palestino? Kial la ukrainoj, kiuj batalas kontraŭ rusaj okupantoj, estas defendantoj kaj herooj, sed palestinaj batalantoj kontraŭ israelaj kontraŭleĝaj koloniistoj estas teroristoj? Certe, tiuj estas retorikaj demandoj, bazitaj sur sentoj, ne sur faktoj, sed ili malhelpas al la ukraina afero.

Rolo de Sovetio

La grava afero por kompreni afrikan akceptadon de la rusa propagando estas la historia rolo de Sovetio en la sesdekaj kaj sepdekaj jaroj, post kiam multaj afrikaj landoj atingis sendependecon. Ganao, Gvineo, Malio, Zairo (nun Demokratia Respubliko Kongo) kaj multaj aliaj volis tiam sekvi socialisman evolumanieron kaj kompreneble turnis sin al Sovetunio. La sovetia registaro milite subtenis diversajn maldekstre orientitajn liberomovadojn. Miloj da afrikaj studentoj, ofte el lokaj elitoj, studis en sovetiaj universitatoj. Hodiaŭ eĉ tiuj, kiuj diplomitiĝis en Odeso aŭ Kijivo, konservas plej multe sovetian aŭ rusan vidpunkton. Dekoj da tiuj stipendiuloj okupas nun altajn poziciojn en registaroj kaj en administraj strukturoj. Kompreneble, ili ofte sentas devoscian lojalecon al Sovetio kaj ĝia daŭriganto – Rusio.

Kontraŭusonismo

Aliflanke, la rusa propagando dum multaj jardekoj laboris por fortigi favorajn esprimojn en Afriko. Tio eble estas la plej efika ilo, kiu baziĝas sur du kolonoj: kontraŭusonismo kaj seninterrompa ripetado de mensogoj. Rusaj politikistoj uzas Usonon por pravigi ĉiujn proprajn maljustaĵojn. Usono invadis aŭ malstabiligis Afganion, Libion, Irakon ktp. Kiu me-

moras, ke Sovetio, ne Usono, enigis sian armeon en la sendependan Afganion en 1979, kio ekigis la putradon de la afgana ŝtato? Kiu konscias, ke la internacia interveno en Libio baziĝis sur rezolucio de UN, kiun Rusio ne kontraŭis? Kiu volus rakonti pri la sangmakulita iraka prezidanto Sadam Husejn, kiu uzis kemian armilon kontraŭ civiluloj en sia propra lando kaj invadis la najbaran Kuvajton?

Mensogoj

Kutime, disputante pri la usona rolo en la mondaĵ ekonomio kaj politiko, kontraŭuloj el ambaŭ flankoj havas raciajn, defendeblajn kaj logikajn argumentojn. Disputo baziĝas sur faktoj. La rusaj politikistoj agas alimaniere – ili ripetas mensogojn pri la historio, pri la situacio en aliaj landoj, pri rusaj aŭ fremdaj politikistoj kaj famuloj, aldonante novajn kaj novajn detalojn, ĝis absurdeco. Hodiaŭ en Rusio, kiel en la libro *1984*, neniu povas aŭ rajtas kontraŭi tiujn ĉi mensogojn, kiuj fariĝas la sola vero por la popolo. La rusaj propagandistoj neas, ke Stalin kaj Hitler estis aliancanoj dum la unuaj du jaroj de la dua mondmilito; homfarita malsato en Ukrainio kaj Kazaĥio ne okazis; la rusa ŝtato neniam koloniis aliajn naciojn; Eŭropa Unio estas nenio pli ol usonaj projektoj kaj kliento, ktp. Nun rusaj ĵurnalistoj, publicistoj kaj

politikistoj ripetas senpaŭze kaj memfide, ke la politika vivo en Ukrainio estas tute trempita en naciismo kaj militismo, ke prezidanto Zelenskij estas drogulo, psika malsanulo, pagata de Usono, ke Ukrainio kaj NATO celis ataki kaj diserigi Rusion. Fluas mensogoj pri okjara genocido en Donbaso, pri subpremataj rusparolantoj, pri kvar regionoj de Ukrainio, kiuj revis iĝi parto de Rusio.

Senfina batalo

En Afriko la historio, spertoj, esprimoj kaj celkonscia rusa propagando miksiĝas kaj formas bazon por grava milito. Tiu batalo estos ege malfacila por Okcidento, ĉar ĉi tie la vero ne ĉiam venkas. Eŭropo devas agnoski, ke tiu ĉi milito ne finiĝos tuj tiam, kiam du flankoj subskribas packontrakton. Tio estas nur batalo, la propaganda milito daŭros kaj daŭros ... ■



Michał Labenda estas pola oficisto kun sperto en mez-aziaj kaj mez-orientaj landoj, esploristo pri la kulturo, historio kaj lingvoj de la mez-aziaj nacioj.

D. R. KONGO

Militaj tagoj vide de interne

Diccon **MASTERMAN**

En sia artikolo *Kurboriĉa vojo al demokratio* (MONATO, 2023/03, p. 3-4) Julius Hauser priskribis la historion kaj aktualan situacion de la milito en Demokratia Respubliko Kongo (DRK). Jam de septembro 2021 mi korespondas kun Immaculée Zawadi kaj ŝia edzo, Joel Muhire, pri ilia vivo en tiu malbenita mondoparto. Mi, krome, mallonge korespondis kun Jonathan Ndayishimiye, ĝis li devis fuĝi al Ugando, kie li nun troviĝas en la rifuĝejo Nakivale. Li estis la estro de la Esperanto-klubo de Bunagana, kiu – same kiel alia en Shanje (Sud-Kivuo) – kreiĝis post kiam Joel Muhire kreis la klubon Rondo Esperantista en sia urbeto Kiwanja-Rutshuru en la provinco Nord-Kivuo. Pro la nunaj vivkondiĉoj en la regiono neniu klubo povas plufunkcii.



Immaculée Zawadi.



Joel Muhire estas esperantisto de 2008, muzikisto kaj komponisto. Vidu detalan biografion en www.senopone.wordpress.com. Li vivas kun siaj edzino kaj fileto en Kiwanja-Ruhutsu en Nord-Kivuo, DRK.

Jen kelkaj informoj ricevitaĵoj de ili.

13a de novembro 2022: La 29an de oktobro M23¹ bombardis nian urbeton; pro timego ni kaŝis nin en la domo. La vivo estas malfacila nun. Malsato estas granda ĉi tie, kaj la vojoj estas blokitaj. Lernejoj ne funkcias. Amike, Immaculée.


3a de januaro 2023: Ni vivas en malbonaj kondiĉoj; kelkfoje mankas manĝaĵoj kaj mono por bezonaĵoj. Nia regiono estas fermita, la vojoj al aliaj urboj estas fermitaj kaj la krizo estas tre granda. Multaj mortas pro malsato. M23 perfortas, rabas kaj mortigas. Mi timegas, kiam mi renkontas ilin sur la vojo. Hieraŭ M23 atakis kaj konkeris tri vilaĝojn. Ni ne

scias, kiam la milito finiĝos. Amike, Immaculée Zawadi.

17a de januaro 2023: Mia edzo Joel kaj mi loĝas en urbeto Kiwanja en regiono Rutshuru, kiu estis malsekura jam en la tempo de mia naskiĝo. Mi mem estas orfino pro la perdo de mia patro! Kiam la milito komenciĝis en Jomba, ni ne sciis, ke ĝi etendiĝos ĝis tie ĉi kaj aliaj vilaĝoj kiel Kishishe, Nyamilima, Kisharo, Kibumba ktp, sed la 29an de oktobro 2022 M23 atingis nian loĝlokon. Ni suferas pro terura krizo kaj severa malsato. Ni estas gedzoj ekde 2020 kaj havas filon, Francisko, kiu komencas paroli. Ni esperas ke li estos denaska esperantisto. Amike, Immaculée.

1. M23 - Armita politika grupo en D.R. Kongo konata ankaŭ kiel *Armée révolutionnaire du Congo* (Revolucia Armeo de Kongo), kiu konsistas plejparte el tucioj, unu el la lokaj etnoj (red.)

Tiaj harhirtigaj rakontoj instigis min peti de Immaculée materialon por artikolo en MONATO, kiun



havigis al mi ŝia edzo, Joel. Pro la artikolo de Hauser en la antaŭa numero mi ellasis multajn ripetajn erojn. Estas tamen interese kompari alian rakonton de la 13a de januaro 2023 kun tiu de Hauser, ĉar li raportas rekte de la batalkampo kaj el persona sperto.

13a de januaro 2023: **La milito en Rutshuru, Kongo-Kinŝaso.** La oriento de Kongo-Kinŝaso, precipe la provincoj Nord-Kivuo, Sud-Kivuo kaj Ituri, troviĝas en senelirejaj vivkondiĉoj jam de jardekoj. Inter multaj ceteraj grupoj, M23 estas noca Ruando-devena milico kiu havis multajn aliajn nomojn kaj havas la simplan celon aneksi Kivuon al Ruando. La 23an de marto 2009, sekve de ĝia invado, estis politikaj interparoloj inter la ribela grupo CNDP kaj la tiama registaro, post kiam la ribeluloj

”

Kelkaj homoj nun komencas veturi al Goma kun timo, ĉar multaj apudvojaj vilaĝoj estas senhomaj

”

La kurzo inter la usona dolaro kaj la konga franko draste malpliboniĝis de 2000 ĝis 2500 frankoj por usona dolaro

aliĝis al la registara armeo, FARDC. En 2012 ili ribelis kaj kreis grupon sub la preteksto, ke la registaro ne respektis la interkonsentojn de la 23a de marto 2009. Tiuj, kiuj restis en la nacia armeo, estas la bazo de la fiasko de FARDC kontraŭ atakoj de M23.

La venenita heredaĵo de Tshisekedi

Prezidento Joseph Kabila ekŝiĝis en 2019 kaj heredigis al sia posteulo, Félix Tshisekedi [ĉisekedi], aron de kompletigitaj kaj subskribitaj (sed ankoraŭ ne aplikitaj) interkonsentoj inter li kaj M23, kiuj celis miksadon de soldatoj de FARDC kun eksterlandaj elementoj – kaj en la kongolanda armeo, kaj en aliaj institucioj de DRK.

Prezidento Tshisekedi tuj komprenis la gravecon de la danĝero de miksado, kiu kaŭzus enfiltriĝon de eksterlandaj elementoj, precipe el Ruando, en la armeon, sekurecajn servojn, politikajn kaj civilajn instituciojn de DRK. Ĉi tio estas la deirpunkto de la nova konflikto ekde marto 2022 kun Ruando, kiu estas apogata de Ugando en la nomo de M23, kio estas oficiale la bazo de la atakoj kaj nuna milito en Rutshuru.

Tshisekedi decidis unue iri laŭ vojo diplomatia anstataŭ milita, kaj Najrobio (Kenjo) kaj Luando (Angolo) ludis gravan rolon ĉi-rilate. La prezidento de Ruando neis, ke li subtenas M23, malgraŭ evidentaj pruvoj de la malo. Se Tshisekedi estus konsent-

inta apliki la interkonsenton subskribitan de Kabila, teorie ne estus nova milito kun Ruando. Tamen tio signifus, ke Ruando havas permeson daŭre kolonii DRK-on kaj forrabi ĝiajn naturajn riĉaĵojn, amasbuĉi homojn, perforti kaj mistrakti DRK-anojn.

La Orient-Afrika Komunumo

En marto 2022 DRK oficiale aliĝis al la Orient-Afrika Komunumo (EAC²) en kies konsisto estas la agresantaj „fratoj”. Pro la krizo, DRK kaj EAC en septembro 2022 subskribis pakton pri deplojado de komuna EAC-trupo por neniigi la malamikajn fortojn. Sekve de du komunaj kunvenoj, la 12an kaj la 22an de decembro 2022, inter M23, oficialuloj de EAC kaj kelkaj membroj de la Komunuma Kontrola Mekanismo de la Regiono de la Grandaj Lagoj, M23 esprimis „geston de bonvolo” – retiriĝi de la konkeritaj teritorioj. Tamen tio estis nura ruzaĵo por elturniĝi en atakoj kontraŭ pliaj vilaĝoj. La sinteno de la regiona EAC-forto estas nekomprenebla: ĝi devojiĝis de sia misio de senarmigo kaj neniigo de M23 kaj aliĝis al ĝi. Kia perfido!

Masakroj

M23 perforte invadis plurajn vilaĝojn de Rutshuru kaj

2. EAC - Mallongigo de la angla-lingva nomo de la inter-registara organizo East African Community (Orient-Afrika Komunumo) (red.)

murdis milojn da loĝantoj. Tre rimarkinda estas la amasbuĉado en Kishishe (Bwito) de pli ol 131 homoj en unu semajno laŭ raporto de fakuloj de Unuiĝintaj Nacioj. Ĉiutage okazas masakroj en diversaj vilaĝoj, kaj M23 ankaŭ prirabas vendejojn, apotekojn, lernejojn manĝostokojn ktp. La reprezentivaj masakroj de la okupanta armeo estas tekniko por teruri kaj subpremi la loĝantaron.

Ekde septembro 2022 ne plu funkcias iuj lernejoj en Rutshuru, vojoj al diversaj urboj ne estas uzeblaj kaj mizero pli kaj pli videbliĝas ĉie. Rifuĝintoj en Kanyaruchinya kaj Vitshumbi tre suferas pro malsato kaj malsano. La nord-kivuanoj petas, ke la internacia komunumo haltigu la militon kaj punu la agresantojn, kiuj malrespektas homajn rajtojn.

Kelkajn tagojn poste, laŭ mia peto, Joel Muhire sendis al mi la sekvajn suplementajn rimarkojn.

31a de januaro 2023: La soldatoj de EAC venis en Kongon kun la celo senarmigi la ribelulojn M23 kaj helpi al rapida reveno de paco, sed bedaŭrinde ilia militestro deklaris, ke ili ne venis batali, kaj admonis, ke estas bone sekvi la diplomatian vojon. Monaton poste ili lokiĝis en Kibumba kiel arbitracianto de la milito post dufoja kunveno. Kio kolerigas orient-konganojn estas soldatoj de M23 en la uniformoj de EAC-soldatoj, kiuj inspektas la urbon Goma en aŭtomobiloj – konspiro, kiu kontribuas al la disigo de Kongo.

Ugando helpas Ruan don aneksi Nord-Kivunon ĉar la prezidentoj de ambaŭ landoj estas samgentaj amikoj, kiuj kunlaboras en multaj aferoj. Tucioj estas invademaj kaj superemaj. Ni konstatis, ke ili

volas uzurpi DRK-on kaj etendi sian regadon en la EAC-landoj.

La milito ne daŭris longe en Kiwanja. Tagojn poste, ĝi etendiĝis al pli malproksimaj vilaĝoj de Rutshuru, Nyiragongo kaj Masisi. Kelkaj homoj nun komencas veturi al Goma kun timego, ĉar multaj apudvojaj vilaĝoj estas senhomaj; aliaj veturas trans la landlimon al Ugando, sed altkoste. Komercistoj nenion venigas de Goma, ĉar la vojo ne estas plene malfermita, tial ĉio restas multekosta ĉi tie. La kurzo inter la usona dolaro kaj la konga franko draste malpliboniĝis de 2000 ĝis 2500 frankoj por usona dolaro.

En mia urbeto, Kiwanja, la plejparto de la loĝantaro estas terkultivistoj. Ni vivas pene, foje sen vespermanĝo, kaj mankas

laboro. Feliĉe mia familio vivas en nia propra domo, sed tiu ne estas finkonstruata, kaj en ĝi mankas elektra kurento. En la tuta Rutshuru mankas bankoj kaj butikoj; vendejetoj kaj apotekoj apenaŭ funkcias; la kosto de ĉio pligrandiĝis. Ni ne povas iri al hospitalo, kaj devis zorgi hejme pri nia filo, kiam li malsaniĝis lastatempe.

Lastmomenta informo: En Goma, la ĉefurbo de Nord-Kivuo, regas granda paniko, ĉar M23 celas tiun urbon, konkerinte la teritoriojn Rutshuru, Bwisha kaj Bwito, Nyiragongo kaj parton de Masisi. Ĝi pretendas esti rompinta la vojon de Goma al Sake-Minova en la teritorio Masisi. Oriente estas Ruando kaj sude la lago Kivuo. Kien povos fuĝi homoj? Samideane, Joel Muhire. ■



“Naturista Vivo”, la ilustrita revuo por nudistoj/naturistoj/nudnaĝantoj. Belaj koloraj fotoj. Senpaga prov-ekzemplero.

La revuo aperas 4-foje jare, sur 16 paĝoj.

Internacia Naturista Organizo Esperantista.
Adreso: József Németh, HU-8531 Ihász, Fő u. 41/5.
Rete: jozefo.nemeth@gmail.com.



NICAN CVI KOHEN

La kontraŭantoj de la reformo asertas, ke ĝi transformos la israelan demokration en malliberalan politikan sistemon similan al tiu de Hungario.

ISRAELO

Ŝtormo pro reformo



Nican **Cvi KOHEN**
Israelo

Centmiloj da homoj protestadas en Israelo kontraŭ la reformo, per kiu oni volas ŝanĝi la rilatojn inter la supera kortumo, la parlamento (*Kneset*) kaj la registaro. Kial tio okazas?

Polemikaj ŝanĝoj

Tre kontestata parto de la nova reformo, proponita de la ministro pri justico Jariv Levin kaj la estro de la parlamenta konstitucia kaj leĝa komitato Simĥa Rotman, estas tiu, kiu antaŭvidas la eblon por la parlamento, per plimulto de 61 el ĝiaj 120 membroj, reaprobi leĝojn nuligitajn de la supera kortumo. Alia ŝanĝo igus, ke la kort-

”

La subtenantoj de la reformo argumentas, ke la supera kortumo estas uzata kiel maldekstra ne elektita forto

umo ne povos interveni pri registaraj nomumoj.

La kontraŭantoj de la reformo asertas, ke ĝi transformos la israelan demokration en malliberalan politikan sistemon similan al tiu de Hungario, kaj estos difektataj la rajtoj de malplimultoj kiel arabaj civitanoj kaj GLAT-uloj, de virinoj kaj eĉ de opoziciaj aktivuloj.

La subtenantoj de la reformo argumentas, ke la supera kortumo estas uzata



NICAN CVI KOHEN

La kontraŭantoj de la reformo asertas, ke estos difektataj la rajtoj de malplimulto kiel arabaj civitanoj kaj GLAT-uloj, de virinoj kaj eĉ de opoziciaj aktivuloj.

kiel maldekstra ne elektita forto, kiu malhelpas la dekstrajn registarojn plenumi iliajn programojn.

Senkonstitucia lando

Israelo ne havas konstitucion. En la deklaro de sendependeco de majo 1948, oni diris, ke Konstitucio estos farita antaŭ la tiujara oktobro – tio, tamen, neniam okazis pro la malfacileco interkonsenti pri la enhavo. Anstataŭe oni aprobis kelkajn „fundamentajn leĝojn”, kiuj reguligas la agadon de la ŝtataj aŭtoritatoj. Rimarkindas, ke malgraŭ ilia graveco tiuj ĉi leĝoj povas esti ŝanĝitaj per favora

”

Laŭ la kontraŭantoj de la reformo, la fina celo de la registaro estas uzi la reformon por nuligi la akuzojn kaj la procesojn kontraŭ la ĉefministro, kiu estas akuzita pri korupto

voĉdonado de la „simpla” plimulto de parlamento.

Konstitucia revolucio

Por bone kompreni, kio okazas, oni devas analizi la historion de la rilatoj inter la israelaj kortumo, *Kneset* kaj registaro. Ĝis 1995 la supera kortumo neniam nuligis leĝon de la parlamento. En 1992 du novaj fundamentaj leĝoj estis aprobitaj: la Fundamenta Leĝo pri Homa Digno kaj Libereco kaj la Fundamenta Leĝo pri Libereco de Okupado. Tiam la prezidento de la supera kortumo, la juristo Aharon Barak, deklaris, ke okazis „konstitucia revolucio”: ekde tiu momento oni povas nuligi leĝojn rompantajn iun fundamentan principon.

Kontrolado de la registara agado

La „Konstitucia Revolucio” de Barak estis tamen eĉ pli granda. La israela kortumo pliigis la uzadon de la „Laŭnorma kialo” en kontrolado de la registara agado. Tiel, en 1995 la supera kortumo ordonis al la tiama ĉefministro Jichak Rabin maldungi la ministraron pri internaj aferoj Arie Deri, kiu estis akuzita pri korupto, kvankam ne ekzistis iu specifa leĝo, laŭ kiu suspektita persono ne povas esti ministro. La kortumo asertis, ke tio ne estas „laŭnorma”, kaj ke tio difektas la publikan fidon en la registaro.

Laŭnorma kialo

Ekde tiam laŭ la principo de la „Laŭnorma kialo” la kortumo intervenis plurfoje en la nomumoj. Laste oni kontestis la ministrigon de Deri kadre de la nova registaro de la ĉefministro Benjamin Netanjahu. Li estas la estro de la partio *Ŝas*, kiu gajnis 11 el 120 sidlokoj en la *Kneset*. Deri jam estis en malliberejo dum tri jaroj pro korupto kaj estis denove kondamnita, laŭ sia propra konfeso, pri impostaj deliktoj.

Laŭ la kontraŭantoj de la reformo, la fina celo de la registaro estas uzi la reformon por nuligi la akuzojn kaj la procesojn kontraŭ la ĉefministro, kiu estas akuzita pri korupto. Dume, la supera kortumo decidis diskuti, ĉu Netanjahu devas demisii pro siaj procesoj, – kaj tio certe ne malakrigos la disputon. ■



Nican Cvi KOHEN estas israela ĵurnalisto de la novajretejo *Davar*, de la israela ĝenerala laborista sindikato, edukisto kaj sociala aktivulo.



VENEZUELO/GUJANO

Historia disputo

Jezer **DORANTE**

korespondanto de MONATO en Venezuelo

Disputo inter Venezuelo kaj Gujano havas sian originon en la 19a jarcento dum la sendependigaj bataloj en Hispan-Ameriko, kiam Venezuelo akiris duonon de la teritorio de la tiama brita kolonio Gujano.

La generalkapitanlando Venezuelo

En 1835 Robert Hermann Schomburgk desegnis landlimon inter Venezuelo kaj Brita Gujano de la rivero Moruca ĝis la rivero Esequibo. Tamen, migrado de britaj koloni-

anoj al la teritorioj situantaj trans la maldekstra bordo de la rivero Esequibo, ene de la venezuela teritorio, estigis la unuan postulon de Venezuelo antaŭ Britio. Intertraktadoj komenciĝis en 1844 per la propono farita de la reprezentanto de Venezuelo, Alejo Fortique, surbaze de la

tiamaj teritorioj de la generalkapitanlando Venezuelo kaj la principo *uti possidetis iure* tiel, ke la rivero Esequibo estu rekonita kiel limlinio, asertante per dokumentoj la venezuelan jurisdikcion en tiuj teroj, kiuj formis parton de la antaŭa provinco Gujano.

En 1835 Robert Hermann Schomburgk desegnis landlimon inter Venezuelo kaj Brita Gujano de la rivero Moruca ĝis la rivero Esequibo.

PUNTO DE CORTE



Venezuelo perdis pli ol 159 500 km² de sia teritorio okcidente de la rivero Esequibo. Kompreneble tio ne favoris Venezuelon kaj ekde tiam la disputo daŭras.

Internacia arbitracio

En 1888 la britoj eniris la venezuelan teritorion kaj prenis pliajn 203 310 km² de la tiutempa Venezuelo, celante atingi ankaŭ la riveron Orinoko. Tio indignigis la venezuelanojn, kaj la 2an de februaro 1897 Venezuelo kaj Britio subskribis la vaŝingtonan arbitracian traktaton, per kiu ili sin devontigis solvi la problemon. Kelkajn jarojn antaŭe, en 1895, Usono eĉ apogis la venezuelan postulon surbaze de la doktrino de Monroe rilate al „Ameriko por amerikanoj”, per kiu oni kontraŭis la dezirojn imperiismajn de la tiamaj eŭropaj potencoj. Post tio en 1899 estis kreita la Pariza Arbitracia Tribunalo, sed rezultis verdikto favore

al Britio, kaj Venezuelo perdis pli ol 159 500 km² de sia teritorio okcidente de la rivero Esequibo. Kompreneble tio ne favoris Venezuelon kaj ekde tiam la disputo daŭras.

Dokumentoj malkovritaj

Tiel alvenis la 20a jarcento, kaj en la jaro 1966 Venezuelo atingis grandan antaŭeniĝon nuligante la arbitracian traktaton antaŭ Unuiĝintaj Nacioj (UN), post la malkovro de dokumentoj, kiuj kompromitis la laŭleĝecon de la traktato. La 17an de februaro 1966 ambaŭ landoj subskribis la ĝeneralan interkonsenton, kiu estis provizora interkonsento por paca kaj definitiva solvo de la landlima konflikto inter ambaŭ landoj.

Inter 1982 kaj 1999, ambaŭ registaroj provis solvi la aferon per la mekanismo de la bonaj oficoj de UN, sed la provoj malsukcesis.

Frostigita solvosercado

La serĉado de solvo al la konflikto haltis kun la alveno de Hugo Chávez al la prezidanteco de Venezuelo, ĉar multaj el liaj internaciaj rilatoj karakteriziĝis per favorado al siaj politikaj aliancanoj interŝanĝe al ilia subteno ĉe internaciaj organizaĵoj. Ekzemple en 2004 Chávez vizitis Georgurbon, la ĉefurbon de Gujano, kaj diris: „La venezuela registaro ne estos obstaklo por iu ajn projekto farita en Esequibo¹, kies celo estas profitigi la loĝantojn de la areo. Tial, la afero pri Esequibo estos forigita de la sociaj, politikaj kaj ekonomiaj rilatoj de la du landoj.”

Petrocaribe estis kreita en la jaro 2005 laŭ iniciato de Chávez. Venezuelo kontribuis per 43 % al la energio konsumata de 17 karibaj landoj, inkluzive de Gujano. Jaron poste, dum renkontiĝo de la Kariba Komunumo kaj la Bolivaria Alianco por la Popoloj de Nia Ameriko, Chávez interkonsentis kun la gujana prezidento Bharrat Jagdeo la frostigon de la disputo por akiri voĉojn de la kariba grupo por la Sekureca Konsilio de Unuiĝintaj Nacioj.

1. La disputata teritorio inter la du landoj.

Malkovrita kuŝejo

Post tio la nuna prezidento Nicolás Maduro daŭrigis la vojon de sia antaŭulo Chávez pri silento rilate al la landlima konflikto. En kunveno de la Konferenco de la Registarestroj en 2019 la Kariba Komunumo aprobis la subtenpeton de Gujano en la landlima disputo. En 2015 la usona naftokompanio *Exxon Mobil* anoncis la malkovron de grava kuŝejo. La gujana registaro aprobis la esplorado, la registaro Maduro protestis, sed ne prezentis apelacion antaŭ internaciaj instancoj.

En januaro 2018 pro manko de solvo per la bonaj oficoj de UN la ĝenerala sekretario de la organizaĵo, António Guterres, resendis la aferon al la Internacia Kortumo en Hago. Konsiderante tion, la venezuela ministro pri eksteraj aferoj respondis, ke Venezuelo restos ligita al la ĝeneva interkonsento, konservante UN kiel la solan peranton, kaj malakceptante la partoprenon de la Kortumo en la konflikto. Tial, la lando ne prezentis ajnan defendon. Konsiderante la rifuzon de la reprezentantoj de Maduro iri al la Internacia Kortumo kaj la manko de forto en la agoj, la suno de Venezuelo povus ĉesi leviĝi super Esequibo. Dume Gujano progresas en la disvolvado de la iam disputata teritorio.





LUDOJ

ALPHASPIRIT.IT / SHUTTERSTOCK.COM

Nova modo plivastiĝas



Roberto Pigro

korespondanto de MONATO en Italio

En Italio la ludo Fantazia Futbalo (itale *fantacalcio*) unuafoje populariĝis en la 1990aj jaroj. Sed laŭ multaj amaskomunikiloj ĝi fariĝis tiom laŭmoda, ke estas kreskanta nombro da ŝatantoj, kiuj „kontaĝas” unu la alian.


La konsisto de la ludo

Temas pri imaga ludo, kiu tamen sin bazas sur la realo: oni uzas donitaĵojn el la matĉoj ĉiusemajne okazantaj kadre de la vera futbala ĉampionturniro de la lando. Ĉiu partoprenanto elektas kaj aĉetas (per imaga mono, sen vere elspezi) la kompon-



Temas pri imaga ludo, kiu tamen sin bazas sur la realo

antojn de la propra „ideala” teamo. Eblas aĉeti piedpilkistojn el ajna teamo de la itala ĉampionturniro (*serio A*, kvankam lastatempe naskiĝis turniroj ankaŭ pri *serio B*) kaj „kombini” ilin plej libere, sen ke estu metitaj ajnaj limoj al ies fantazio kaj kompetento. Oni do povas havi senprobleme en la sama teamo la golulon de



POSTMODERN STUDIO / SHUTTERSTOCK.COM

Lazio, defendantojn el Fiorentina kaj Udinese, avandulojn el Bologna kaj Napoli ktp.

Ĉiu aliĝinto, antaŭ la komenciĝo de la vera ĉampionturniro, fariĝas „trejnisto” de teamo, kiun li mem starigas, kaj li havas je sia dispono buĝeton por klopodi gajni imagan ĉampionturniron. Ofte oni preparas etajn premiojn: pokalon, pladon kaj ankaŭ krozadon, aŭtomobilon, biciklon ktp, kvankam kelkfoje ne estas veraj premioj.

En la listo de aĉetovendo ĉiu piedpilkisto havas apartan merkatan valoron, kiu dependas de lia antaŭa kariero kaj ankaŭ de la rendimento – okaze de la merkat-sesioj, kiujn oni malfermas de tempo al tempo, ekzemple en januaro –,

kiun li montras dum la konkerna sezono. Ekzemple, post kelkaj bonaj matĉoj pliriĉigitaj de iom da belaj goloj, lia kosto nepre altiĝos. Male, post maltrafoj aŭ malebloj ludi en longa periodo, lia prezo malaltiĝos. Estas kvazaŭ ĉiu piedpilkisto estas kvotata ĉe imaga sporta borso. Oni povas aĉeti piedpilkiston kontraŭ 1 monero kaj revendi lin post kelkaj monatoj por 30 moneroj, per kiuj oni povas aĉeti 2-3 bonajn futbalistojn. Do, iuj aĉetoj povas fariĝi speco de investo por la estonteco, sed estiĝas ankaŭ risko: ne utilas strebi al atleto, kiu poste neniam ludas.

Plej bonaj ludantoj

Komence de la fantazia ĉampionturniro (kiu povas esti private organizita nur

kun la propraj amikoj, per sendo al ili de speciala invito; aŭ publike kun nekonaĵoj), ĉiu imaga trejnisto kreas sian piedpilkistan grupon utiligante la antaŭe fiksititan buĝeton: plej ofte oni havas 200 „monerojn”, kiuj devas esti nepre uzataj por la aĉeto de 3 goluloj, 8 defendantoj, 8 terenmezuloj kaj 6 avanduloj. Oni ne povas aĉeti malpli ol 25 futbalistojn, kaj pro tio oni devas trovi la ĝustan kompromison inter famo, lerteco, talento kaj bezono pri ŝparado (kio postulas la aĉeton de iuj nepopularaj futbalistoj).

Oni kutime rajtas elekti 2-3 tre konatajn atletojn el prestiĝaj teamoj, sed oni devas cetere klopodi intuiciei kiuj – inter la malpli konataj piedpilkistoj aŭ tiuj el la malpli famaj teamoj – estos la plej bonaj ludantoj de la imag-turniro. Ne necesas elspezi ĉiujn monerojn, se oni sukcesas krei bonan teamon je malalta kosto: la restanta mono tiuokaze povas esti utiligata en la venontaj merkataj sesioj.

La formado de teamoj postulas bonan konon de la diversaj piedpilkistoj kaj de la ebloj de ĉiuj teamoj, inkluzive de la malpli konataj. Estas aldone rekomendinde elekti anojn el pluraj teamoj, tiel ke, en ĉiu tago de la imaga turniro, oni povos elekti la plej taŭgajn piedpilkistojn, kiuj ludos (ekzemple sur la hejmttereno) supozeble facilan matĉon aŭ kiuj apartenas al vera tea-

”

Nun, danke al la teknologio, ĉio ĉi pli simplas: estas retpaĝaroj kaj apoj, kiuj ebligas al ĉiu persono tre simple formisian teamon, kaj amuziĝi kun amikoj aŭ nekonatoj, flegante la ĉiaman revon fariĝi sukcesa futbal-trejnistoj!

mo, kiu tiumomente tre brilas. La nomo de la teamo kaj la koloroj de la ĉemizo estas libere elekteblaj.

Duona horo

Antaŭ ĉiu „tago” de la ĉampionturniro, kiu en Italio kutime okazas sabate aŭ dimanĉe, kvankam fojfoje oni ludas meze de la semajno, la imaga trejnisto devas – plej malfrue duonan horon antaŭ la komenciĝo de la unua „vera” matĉo – liveri al la ceteraj unuopaj partoprenantoj (aŭ al la mastruma sistemo, se oni uzas interretan/poŝtelefono version de la ludo) sian oficialan liston, elektante (inter siaj 25 teamanoj) 11 bazulojn kaj 7 rezervulojn. Kelkaj atletoj ja devas resti ĉiufoje ekster la ludo, kaj trejnistoj kompreneble esperas, ke ili ne multe golos, ĉar male tio signifas, ke ili ne faris la plej ĝustan decidon koncerne la tiutage plej lertajn piedpilkistojn. La problemo ne ekzistas, se en onia teamo multaj atletoj suferis akcidenton, kaj tiuj iĝis rezervuloj ankaŭ en sia vera teamo. Oni povas sekvi, laŭ la haveblaj piedpilkistoj (ne malofte iuj estas elkonkursigitaj aŭ resaniĝantaj), unu inter la jenaj sistemoj: 4-4-2, 4-3-3, 4-5-1, 5-3-2, 5-4-1, 3-4-3 kaj 3-5-2 (la unua nombro indikas la defendantojn; la dua la terenmezulojn; la lasta la avanulojn). Al ĉio ĉi oni ja aldonas unu golulon. Ne eblas utiligi samtempe pli ol 3 avanulojn. La listo, fiksita

antaŭ la komenciĝo de la veraj matĉoj, nenial povas esti modifata en la daŭro de la unutaga ĉampionturniro. Oni devas atendi la postan tagon por scii la rezultojn de la imagaj matĉoj surbaze de tiuj de la realaj matĉoj.

Kromaj poentoj

Post la fino de la imaga sporta konkurso, kutime la sekvontan matenon, ĉiu piedpilkisto ricevas poentaron de 1 ĝis 10 (eblas frakcia poentaro). Ĝi dependas de la averaĝa poentaro donita al ĉiu ludinto fare de la itala gazetaro. Kelkfoje oni elektas ununuran fonton, sed la kriterio pro unuecaj kialoj devas esti klara kaj ne ŝanĝiĝi en la daŭro de la turniro. Al tiu ĉi poentaro oni adicias kaj maladicias poentojn, laŭ la okazintaĵoj de la veraj matĉoj. Jen +3 poentoj se oni golis, +1 pro ĉiu plenumita transludo (traa ŝoto, kiu rekte kaj klare ebligas al alia kunulo goli), -1 pro ĉiu golo en la propra golejo (tio validas nur por la golulo) aŭ elpeliĝo (ruĝa slipo), -0,5 pro admono (flava slipo), -3 pro punŝoto maltrafita, +3 pro punŝoto blokita (nur en la okazo de golulo). Oni elektas en iuj turniroj eĉ teamestron, kies kromaj poentoj ja havos duoblan valoron. Lia golo ekzemple estos premiita per 6 poentoj, lia elpeliĝo estos punita per -2. Oni kutime ne elektas golulon kiel estron, ĉar ĉiu kontraŭa golo fariĝus duobla. Plej multaj partopren-

antoj elektas la avanulon, kiu ŝajne havas pli da ebloj goli.

Klasifikoj

La kalendaro de ĉiu turniro de fantazia futbalo estas simila al tiu de iu ajn reala ĉampionado. Krom la klasika klasifiko de ĉiu rimbatalo (baziĝanta sur venkoj, egalstatoj, malvenkoj, goloj faritaj, goloj ricevitaj), ekzistas kutime ankaŭ dua klasifiko pri la teamoj kun la plej alta ĝenerala poentaro. La ordo de la teamoj en la du klasifikoj ne nepre estas la sama. Fojfoje eblas okupi la unuan lokon en unu klasifiko kaj la trian en la alia.

La hejmteneran faktoron foje oni ja konsideras: la loka (do la unue menciata en iu matĉo) teamo gajnas tiuokaze du poentojn plian, ĉar kutime en la vera futbalo la hejmluloj danke al la subteno de la publiko havas pli grandan probablon gajni la matĉon. La teamoj, depende de la nombro, estas metataj en rimbatalojn, kiuj siavice havas la saman nombron de partoprenantoj, kaj la fina poentaro estas la sumo de la poentoj de ĉiuj piedpilkistoj.

La sistemo por kalkuli la golojn faritajn de la teamo estas la jena: malpli ol 66 poentoj = 0 goloj; 66-71,5 poentoj = 1 golo, 72-77,5 = 2 goloj, kaj tiel plu, kun intervaloj de 6 poentoj inter unu golo kaj la alia. Ĉi tio estas tre grava: oni ne vere

interesiĝas pri la nombro de goloj fare de la atletoj en la vera ĉampionturniro (ekzemple 2), sed oni sin bazas sur la totala poentaro de ĉiuj futbalistoj. Se unu el la elektitaj bazuloj fine ne gajnas poentojn (ĉar li ne ludas aŭ li ludas nur etan parton de la matĉo, kaj la gazetoj decidis ne prijuĝi lin), li estas aŭtomate anstataŭigata de la unua samrola rezervulo antaŭe elektita de la trejnisto. Se neniuj rezervulo ludas, la teamo havas unu malplian ludanton; oni do konsideras nur la poentaron de la piedpilkistoj, kiuj efektive ludis. Elektante la ludontan teamon, oni do devas esti certa aŭ preskaŭ certa, ke la elektitaj atletoj ludos aŭ havos multajn eblojn ludi almenaŭ parton de la matĉo. Aliokaze oni riskas perdi altvalorajn poentojn kaj malvenki matĉon kontraŭ alia imaga trejnisto.

Retpaĝaroj kaj apoj

Fantazia futbalo plaĉas al ĉiuj kaj nun kulturen kiun ajn: junajn kaj maljunajn personojn. Ĝi ekzistis jam antaŭ 20 jaroj, sed oni tiam bezonis paperon kaj daŭran cerbumadon por kalkuli la mezumajn poentarojn kaj kompreni la finajn rezultojn. Nun, danke al la teknologio, ĉio ĉi pli simplas: estas retpaĝaroj kaj apoj, kiuj ebligas al ĉiu persono tre simple formi sian teamon, kaj amuziĝi kun amikoj aŭ nekonatoj, flegante la ĉiaman revon fariĝi sukcesa futbal-trejnistoj! ■

MIGRADO

Fuĝantoj bonvenaj kaj ne bonvenaj



Werner Fuss

korespondanto de MONATO en Germanio



Ĉe la pola-ukraina landlimo en marto 2022.

DAVIDE BONALDO / SHUTTERSTOCK.COM

De Ukrainio atingis Germanion ĉirkaŭ unu miliono da fuĝintoj pro la milito. Ili plejparte venis tra Pollando. Malgraŭ sia laŭnombre nur duona loĝantaro, ĝi bonvenigis duoblan nombron. Kontraste, la pola registaro ne volas akcepti alilandajn fuĝantojn, kiuj atingas la polan landlimon el Belorusio (kelkaj miloj, kiujn la belorusa prezidanto invitis kaj kuraĝigis pluvojaĝi al Eŭropa Unio (EU)).

Pollando konstruis longan barilon el ŝtalo kaj pikdrato. Tamen kelkaj fuĝantoj atingas Pollandon kaj eĉ Germanion. En Pollando ili regule estas mistraktataj kaj reenpuŝataj. Sed ankaŭ en Germanio ili ne estas sekuraj, ĉar en EU la Reglamente Dublino III¹ diktas, ke fuĝanto petu azilon en la EU-lando, kien li/ŝi unue alvenis. La interkon-

1. Reglamente n-ro 604/2013, kiu difinas kiu membro-ŝtato respondecas pri ekzamenado de azilpeto.



De Ukrainio atingis Germanion ĉirkaŭ unu miliono da fuĝintoj pro la milito

sento permesas resendi fuĝantojn al la alvenlando, kaj la germana Federacia Oficejo pri Migrado kaj Fuĝantoj (BAMF, laŭ germanaj komencliteroj) ofte faras tion.

Justico kontraŭ mistraktado

Sed la justicaj instancoj povas interveni. Ekzemple, juĝejoj ofte malpermesas resendi iun, kiu ricevis azilon en Grekio kaj poste aperis en Germanio, ĉar li/ŝi kun certeco devus vivi surstrate, sen ŝtata subteno.

Ankaŭ aliaj EU-landoj mistraktas fuĝantojn. Ekzemple, se ili sukcesas transpasi la bulgaran landlimon, oni regule metas ilin en malliberejon, pri kio aŭdeblas hontindaj historioj. Se iu el ili atingas Germanion, la juĝejoj ofte ne permesas resendadon, ĉar ne estas pruvita regulo, kiel ili estos traktataj, kvankam la bulgara registaro asertas, ke ĝi respektas la internacian juron. Pro la miloj de malaj raportoj eble la juĝistoj ŝanĝos sian sintenon pri tio.

Ĉu pli bone en Pollando?

Tamen pri Pollando ankoraŭ ne estas multaj raportoj. La germana neregistara organizaĵo *Pro Asyl* (Por azilo) kolektas raportojn de azilpetantoj kaj per advokatoj subtenas individuojn. Jen unu tia historio de *Pro Asyl*.

Sepideh Bahrami (la vera nomo estas kaŝita), de Irano, defendas sin kontraŭ sia brutala edzo, ekhavas konflikton kun sia familio, estas minacata de sia patro ... timas plian perforton fare de la familio kaj de la mulaa registaro, fuĝas tra Turkio kaj Belorusio. Dum kontrolo ĉe la pola landlima polico ŝia tuta mono malaperas. Post pluraj provoj ŝi sukcesas transpasi al Pollando. La polico puŝas ŝin per armiloj kaj elektrobastonoj kaj sendas ŝin reen al Belorusio. Post multaj malsukcesoj ŝi atingas marĉan re-

”

Pollando konstruis longan barilon el ŝtalo kaj pikdrato

”

Se ili sukcesas transpasi la bulgaran landlimon, oni regule metas ilin en malliberejon

”

La germana neregistara organizaĵo *Pro Asyl* kolektas raportojn kaj per advokatoj subtenas individuojn

”

Provoj pri reformado de Reglamenteo Dublino III malsukcesis pro la sinteno de kelkaj landoj

gionon en Pollando, trovas akcepton ĉe pola virino kaj alvenas en Germanion en januaro de 2022. *Pro Asyl* subtenas ŝin ĉe BAMF per advokataj demarŝoj.


Ĉu facila solvo?

Principe EU povus solvi la problemon. Se fuĝantoj el iu lando estas grandanime akceptataj de iu lando, sed ne de alia, kial la malakceptitajn fuĝantojn ne transprenas alia lando, kiu ne havas problemojn koncerne ilin?

Bedaŭrinde provoj pri reformado de la Reglamenteo Dublino III malsukcesis pro la sinteno de kelkaj landoj (Hungario, sed ankaŭ Pollando), kiuj timas, ke ili estos devigataj transpreni azilpetantojn. ■



Werner Fuss studis kemion en Germanio kaj doktoriĝis en 1972 pri spektroskopio. Poste ĝis 2008 en esplorinstituto li laboris kun fizikistoj pri laserkemio, unue pri apartigo de izotopoj kaj poste pri ultrarapidaj fotokemiaj reagoj. Kromaj publikigoj kaj prelegoj koncernas armadolimigon, medioprotektadon kaj klimatovarmigon.



Artikolojn pri la vivo en via regiono sendu al moderna_vivo@monato.be.

AŬSTRIO

Omaĝo al la svedo Arne Karlsson



Renate kaj Walter **KLAG**
korespondantoj de MONATO en Vieno



La estonta haltejo Arne-Karlsson-Park troviĝos proksime de la Viena Ĝenerala Hospitalo.

Unu el la haltejoj de la nova subtera linio U5 en Vieno havos la nomon „Arne-Karlsson-Park”.

La haltejon oni ekkonstruos en 2026 proksime de la Viena Ĝenerala Hospitalo, ĉe la kruciĝo de la stratoj Spitalgasse kaj Währinger Straße en la 9a distrikto de Vieno. Tie ĝi estos komuna haltejo de sep tramlinioj.

Subita forpaso

Arne Karlsson naskiĝis en 1912 en Stokholmo.

Post la dua mondmilito li laboris kiel estro de la helporganizaĵo *Savu la infanojn en Aŭstrio (Rädda Barnen Österreich)*. Tiu organizaĵo ĉiutage disponigis 70 000 manĝo-porciojn por la malsata viena loĝantaro.

La 11an de junio 1947 dum plenumado de siaj humanitaraj servoj Arne Karlsson aŭtoveturis apud la aŭstra vilaĝo Berg, 60 km oriente de Vieno, ĉe la landlimo inter Aŭstrio kaj tiama

Ĉeĥoslovakio, proksime de Bratislavo. Li erare veturis en baritan straton kaj komencis turni sian aŭton. Ĝuste tiam soldato de la rusa okupacia trupo erare pensis, ke Karlsson estas spiono. Li ekpafis al la aŭto, en kiu ankaŭ la edzino kaj la infano de Karlsson sidis. Arne Karlsson estis trafita je la malantaŭa parto de la kapo kaj tuj mortis. Li estis nur 34-jara.

Aliaj memoraĵoj

Ekde 1961 troviĝas memorejo pri Arne Karlsson en Berg ĉe Pressburger StraÙe (strato al Bratislavo). En Vieno oni alinomis en 1949 la tiaman Holzknec-

Park al Arne-Karlsson-Park. Ĝi estas unu el la plej grandaj verdaj oazoj en la 9a distrikto de Vieno kun areo de ĉirkaŭ 12 500 m².

Guido Holzknecht (1872-1931) estis radiologo, universitata profesoro kaj ĉefkuracisto en la Ĝenerala Hospitalo en Vieno. En 1932 post lia tragika morto tiu parka areo ricevis lian nomon, kaj sub parkarboj staras nun bronza busto de la kuracisto.

Origine en la mezepoko sur la loko de tiu parko troviĝis hospitalo, kaj ekestis apude tombejo por pestmortintoj en la jaro 1679. Inter 1858 kaj 1860 la viena komunumo konstruis domon por helpobezonaj,

maljunaj, malsanaj homoj. En 1928 oni malkonstruis tiun domon kaj faris parkon.

Alia monumento en la parko honorigas la svedinon Elsa Brändström, kiu naskiĝis en 1888 en Sankt-Peterburgo, Rusio, kaj mortis en 1948 en Kembrigo, Usono. Ŝi estis sveda instruistino kaj militflegistino, konata kiel „Anĝelo de Siberio”. Senlace ŝi laboris por la rajtoj de militkaptitoj dum la unua mondmilito, kaj post la milito ŝi daŭre faris humanitaran laboron en Germanio kaj Usono.

Dum la dua mondmilito estis konstruitaj en la parko du bunkroj, kiuj protektis ĝis 800 personojn kontraŭ bomboj kaj venenaj gasoj.

En unu troviĝas nun muzeo. La alia bunkro estas nun uzata de universitata gimnastikejo. ■



Renate KLAG

naskiĝis en Vieno, studis tie la anglan lingvon, ekonomion kaj geografion. Ŝi laboras nun kiel ĵurnalisto.



Walter KLAG

naskiĝis en Vieno, studis tie fizikon kaj laboras nun kiel eldonisto, numismato kaj ĵurnalisto.

La foto de la monato

La foto de la monato, „Voko de la nokto”, estis farita de nia abonanto Lode van de Velde el Antverpeno. Ĉu ankaŭ vi deziras aperigi vian artisman foton tie ĉi?

Sendu ĝin al monato.wetransfer.com.



SATELITOJ

Venezuelo kaj Ĉinio kunlaboris



Jezer **DORANTE**

korespondanto de MONATO en Venezuelo

En 2005 Venezuelo kaj Ĉinio subskribis kunlaboran interkonsenton por krei kaj lanĉi sateliton en la kosmon. Tri jarojn poste, la 29an de oktobro 2008, la satelito Simón Bolívar (VENESAT-1) estis lanĉita de la satelita centro Xichang en sud-okcidenta Ĉinio. Temis pri bonega novaĵo por la venezuela popolo, ĉar la celo de tiu satelito estis faciligi la aliron kaj dissendon de datumservoj por Interreto, telefonio, televido, televidmedicino kaj televidedukado. Por atingi la plej malproksimajn lokojn, oni instalas ligpunktojn kun la satelito en diversaj lokoj, tiel ke edukado, diagnozo kaj informado estu garantiataj en reala tempo al tiu loĝantaro, kiu eble ne havas aliron al iu ajn komunikilo kaj trejnado.

La 28an de septembro 2012 estis lanĉita el Xichang dua venezuela satelito, nomata Francisko de Miranda (VRSS-1) por observadaj funkcioj. Tiu ĉi satelito observas la movadon de militfortoj, detektante naturresursojn, medion kaj nepermesatajn agadojn, kiel ekzemple minado kaj kontraŭleĝa kultivado. Ĝi provizas ankaŭ ĝisdatajn bildojn de la lando por la preparado de topografiaj mapoj. Ĝi cetere estas konstruciita por plenumi

taksadon de agrikulturaj grundoj, kultivaĵoj kaj produktado. En administra planado de la medio ĝi povos taksadi la akvoresursojn kaj la areojn en risko de dezertiĝo. Alia celo estas faciligi urboplanadon kaj akiri geologiajn informojn por antaŭvidi tertremojn kaj aliajn katastrofojn.


En 2017 estis lanĉita la tria satelito venezuela el centro en la ĉina provinco Gansu, kun la nomo Antonio José de Sucre (VRSS-2). Samkiel la satelito VRSS-1, ĝi faros mapadan

laboron kaj inkluzivas novan altdifinan fotilon kaj infraruĝan fotilon por diagnozi grundojn kaj akvoresursojn kaj havigi datumojn por antaŭvidi sismojn. Laŭ la tiama vicprezidanto Tarek El-Aisami ĉi tiu satelito utilos kiel ilo por projektoplanado en fakoj kiel ekzemple agrikulturo, sano, energio, nutraj-sekureco, soci-natura risk-mastrumado kaj civitana sekureco.

Malapero kaj malŝalto

En aprilo 2020 la venezuela ministrejo pri sci-

enco kaj teknologio sciigis, ke ĉi tiu satelito falis el sia orbito. Laŭ Luis Zambrano, inĝeniero pri telekomunikado, la malfunkciiĝo de VENESAT-1 povis kaŭzi interna damaĝo al la satelito, ekzemple pro fuŝkontakto; tio havigis malĝustajn informojn al la datumsistemo, kaj sekva fiasko ne povis esti malhelpita. Pro tiu malfunkciiĝo la venezuela registaro devis kontakti usonan satelit-provizanton por povi uzi la sateliton INTEL-SAT-14 kaj tiel konekti la landon denove. ■



CRISTÓBAL ALVARADO MINIC



MARIDAV / SHUTTERSTOCK.COM

AKTUALE

Aviadilaj 5G-aparatoj: novaĵoj por eŭropaj vojaĝantoj



Paolo **OMODEI-ZORINI**
Italio

Eŭropa Unio aprobis novajn regularojn pri la uzado de poŝtelefonoj kaj elektronikaj aparatoj en aviadiloj, kio ebligas rimarkindan plibonigon de normoj rilate flugvojaĝadon. Ĉi tiu artikolo fokusigas sur la uzo de 5G-teknologio kadre de celata kontinent-skala integriĝo de interretaj kaj telefonaj servoj.

5G: kio ĝi estas

5G estas la kvina generacio de poŝtelefona teknologio, kaj ĝi estas konceptita por esti pli rapida, pli fidinda kaj pli efika ol la antaŭaj versioj. 5G-retoj uzas pli altan frekvencon de radi-ondoj ol la antaŭaj. Tiel ili transdonas datumojn je multe pli alta rapideco.

Kelkaj el la avantaĝoj de 5G-poŝtelefonoj inkluzivas pli rapidajn elŝutadon kaj alŝutadon, pli malaltan res-



Oni disponas aliron al Interreto, ene de la kajuto de ekipita aviadilo, per speciala reta ekipaĵo

pondotempon, sed ankaŭ kaj precipe la kapablon subteni pli da aparatoj samtempe sur la reto. Tio igas 5G-poŝtelefonojn aparte taŭgaj por tiuj apoj, kiuj postulas multajn datumojn aŭ komunikadon realtempan.

Aviadiloj kaj poŝtelefonoj

Oni scias, ke flugkompanioj en la ĵusa pasinteco ĝenerale ne permesis uzadon

de poŝtelefonoj dumfluge, kaj efektive ankoraŭ hodiaŭ nur flugreĝimo estas ebla. Kelkaj kompanioj akceptas, ke pasaĝeroj uzu siajn elektronikajn aparatojn (kiel poŝtelefonoj aŭ tabulkomputiloj), sed nur por navigi en Interreto aŭ uzi retajn aplikaĵojn: plenumi telefonvokojn ne estas laŭleĝe. Tio cetere apenaŭ estus teknike ebla pere de la ordinara telefona reto. Ĉi tio devos ŝanĝiĝi rapide, pro la novaj normoj rilate al la uzado de surŝipaj telefonaparatoj.

Finfine tamen Eŭropa Komisiono postulis, ke membroŝtatoj asignu apartan frekvencaron por la uzado de 5G-sistemoj en aviadiloj. Ĉi tiu novaĵo malfermas la vojon al ĝenerala disvastiĝo de 5G-servoj: oni disponas aliron al Interreto, ene de la kajuto de ekipita aviadilo, per speciala reta ekipaĵo, t.n. „pikoĉelo”, por ligi la uzantojn kaj tiamaniere direkti vokojn, tekstojn kaj datumojn inter la aviadilo kaj la surtera telefonreto, kutime danke al satelitreto.

Problemoj, zorgoj, solvoj

Kiel maljuna piloto, la verkanto ne vidas problemojn en ĉi tiu eŭropa programo, kiu komenciĝos dum la somero de 2023, sed eble utilas klarigi iujn eblajn zorgojn kaj difini, kial ĉi tiu noveca teknologio estos grava por faciligi la dumflugan vivon.

”

Tio povas igi vojaĝadon pli senzorga, ĉar pasaĝeroj povas tiel aliri informojn

”

Tia uzado estas grava ankaŭ por aviadistoj: ekzemple ili povas konsulti ĝisdatajn veterinformojn aŭ uzi integritajn GPS-funkciojn

”

La konataj 5G-konspiraj teorioj estas evidente senbazaj

”

Ideale do la Komisiono devus ne nur aprobi specifan frekvencaron de 5G uzeblan sur aviadiloj, sed ankaŭ devigi aviad-kompaniojn adopti tiajn sistemojn

Voĉvokoj ebligas al pasaĝeroj resti en kontakto kun siaj amikoj, familio kaj kolegoj, dum ili estas en aero. Tio povas esti aparte utila okaze de urĝo aŭ neatendataj prokrastoj. Tio povas igi vojaĝadon pli senzorga, ĉar pasaĝeroj povas tiel aliri informojn, fari rezervadojn aŭ aĉeti biletojn dum la veturado. Tia uzado estas grava ankaŭ por aviadistoj: ekzemple ili povas konsulti ĝisdatajn veterinformojn aŭ uzi integritajn GPS-funkciojn.

Plej alta sekureco

Iuj homoj eble zorgos pri eblaj san-konsekvencoj koncerne elmeton al la elektromagneta radiado de poŝtelefonoj. 5G-teknologio tamen ne estas danĝera: jam ekzistas multaj aliaj aparatoj, kiuj uzas la saman frekvencaron sen ajna malfavora sekvo por homa sano (ilia frekvenco estas 5 gigahercoj, kiel por vifenkursigiloj). La konataj 5G-konspiraj teorioj estas evidente senbazaj (kiel tiuj pri kemiaj spuroj; sed la verkanto scias, ke iuj legantoj verŝajne ne kredos lin, ĉar li estas aviadisto).

Estas certe ankaŭ timo, ke la uzado de poŝtelefonoj povus interferi kun la funkciado de aviadilaj sistemoj, sed, dum pli ol 15 000 flughoroj, la verkanto neniam spertis iun ajn interferon inter aviadiloj kaj poŝtelefonoj. Ĉi tio neniam estis prizorginda afero, ĉar modernaj aviadiloj havas

novajn elektronikajn aparatojn, kiuj povas nuligi ĉian interferon.

Sola vera zorgo? Eblaj misuzoj

Fine, la verkanto opinias, ke estas facile por ĉiuj agnoski, ke ĝis nun flugado estis malofta momento (necese malplaĉa) de deva izoliteco rilate al la eblo komuniki kun foraj personoj. Ideale do la Komisiono devus ne nur aprobi specifan frekvencaron de 5G uzeblan sur aviadiloj, sed ankaŭ devigi aviad-kompaniojn adopti tiajn sistemojn, kiuj garantias ankaŭ kelkajn bazajn rajtojn de la pasaĝeroj.

Eble la sola malfavora noto estos la probable malbona konduto de kelkaj pasaĝeroj, kiuj misuzos siajn elektronikajn aparatojn, ĝenante personojn ĉeestantajn. Por eviti tiun problemon, necesos plibonigi la sentivecon de ĉiuj – kio cetere devus okazi ankaŭ surtere kaj ne nur en aero. ■



Paolo OMODEI-ZORINI estas piloto, fluginstruisto kaj flugekzamenisto el Italio. Li estas administra direktoro de la kompanio *Alpha Lima Aviation* en Torino.



ESTEBAN PAREDES DRAKE / EFE

SEKECO

Klimatŝanĝiĝo kaj incendioj detruis sudan Ĉilio



Leonardo **ARAYA**
korespondanto de MONATO en Ĉilio

La 31an de januaro en Ĉilio estis anoncote, ke okazos varmega periodo en venontaj tagoj. Klimataj spertuloj diris, ke la temperaturoj en la sudo de Ĉilio atingos pli ol kvardek gradojn celsiajn, kaj avertis pri grava sekeco en la regionoj Bío-Bío kaj Ñuble. Tiam neniu supozis, ke tiu varmega periodo estas kaŭzonta la plej grandan naturan katastrofon de la lastaj jaroj en Ĉilio.

Sole la 2an de februaro okazis 177 arbarbrulegoj, plejparte en zonoj de pina kaj eŭkalipta arbarkultivado. En kelkaj okazoj la flamoj konsumis multajn domojn, kiel en Santa Juana, kie loĝantoj estis lasitaj sen posedaĵoj krom la vestaĵoj, kiujn ili surhavis.

La nombro de incendioj rapide premeĝis la arbargardistojn, kiuj kontraŭbatalis ilin. La loĝantoj komencis fari ĉion, kion ili povas, por savi sian hejmon. Baldaŭ evidentiĝis, ke la krizo bezonas tutlandan respondon.


”

Ni bezonas memori, ke problemoj, kiujn la regionoj kun grava ekstrakta ekonomia aktiveco travivas, estas produkto de tutmonda klimata krizo

Tutlanda krizo

La 3an de februaro prezidanto Gabriel Boric [bóriĉ], kiu feris en la regiono Aysén, suspendis sian ripozon por kunordigi la krizan respondon en la regiono Ñuble. Li deklaris krizo-staton, kio permesas uzi la armeon por helpi pri la krizo, kaj samtage okazis la plej drameca momento de la katastrofo: mararmeanoj ŝipe evakuis loĝantojn de Punta Lavapié, dum la brulego estis detruanta la urbeton.

La arbarbrulegoj daŭris multajn tagojn kaj detruis multajn urbetojn kaj arb-



Satelita bildo de la situacio pri incendioj el la 6a de februaro 2023.

arojn. La fumo de la bruligoj estis tiom granda, ke ĝi atingis la ĉefurbon Santiago pli ol 350 km norde, la 5an de februaro. Krome, la socia krizo aperas tiom granda, ke la 9an de februaro Boric deklaris noktan elirmalpermeson pro rabado en la zono.

La damaĝo al la medio de Ĉilio estas nekalkulebla, kaj neniu scias, kiom da jaroj la zono bezonas por resaniĝi. Ministrino pri internaj aferoj Carolina Tohá diris, ke kio kutime forbrulas en du jaroj, nun forbrulis en kvin tagoj.

La kialo de la arbarbrulegoj

Kiam tiom granda tragedio okazas, homoj ofte bezonas klarigojn, kaj kiam tiuj ne estas evidentaj, ili komencas kredi komplotajn teoriojn. Tiel, kelkaj homoj kulpigis supozatajn teror-

”

Neniu supozis, ke tiu varmega periodo estas kaŭzonta la plej grandan naturan katastrofon de la lastaj jaroj en Ĉilio

”

Multaj kolektadaj centroj estis instalitaj en la plej grandaj urboj por disponigi vestojn, manĝaĵojn kaj higienajn utilaĵojn

istojn, kiuj, laŭ ili, bruligis la arbarojn favore al indiĝenaj movadoj. Aliaj kulpigis arbarindustriojn, kiuj, laŭ ili, bruligis komercan arbaron por kolekti asekurojn. Senkonsidere tion, plej probable la kialo estas neglekto fare de homoj, bruligantaj ŝtipegojn dum kampado aŭ lasintaj brulantajn cigaredrestaĵojn ĉe aŭtovojoj.

Sed homoj rajtas demandi, kiel la arbarmastrumado helpas aŭ malhelpas preventi incendiojn. Dum la lastaj jaroj, la arbarmastrumado detruis aŭtoktonajn arbarojn en la regiono, anstataŭigis speciojn kiel ĉilia mirto kaj ĉilia laŭro (*Laurelia sempervirens*) per pino kaj eŭkalipto, kiuj estas fremdaj specioj kaj bezonas pli da akvo ol aliaj arboj.

Pro tio iuj homoj postulis, ke la registaro limigu la arbarmastrumadon, kio estas tamen malfacila, ĉar ĝi nun uzas pli ol tri milionojn da hektaroj kaj konsistigas 2 % de la MEP de Ĉilio en 2017. Multaj homoj laboras en la arbarindustrio en la zono, kio estas tre grava por ilia vivo.

Nun, la brulegoj en Ĉilio helpas al la tuta mondo memori, ke la efikoj de la klimatsanĝiĝo estas tre gravaj, ne nur por la klimato aŭ la planedo, sed ankaŭ por la vivo de la homoj, kiuj suferas pro ĝiaj efikoj. Arbarindustrio funkcias en Ĉilio de multaj jaroj, kaj incendioj ofte okazis en someraj monatoj, sed ni devas akcepti, ke en estonteco ni havos pli

altajn temperaturojn, pli da sekeco en la tuta lando kaj la efikon de senpluveco, kiun Ĉilio travivas jam de dek jaroj. Do, eble arbarbrulegoj estos pli teruraj, eĉ se ni prepariĝas por ili.

Problemo tutmonda

Estas kompreneble, kiam klimataj aktivistoj proponas ŝanĝi la manieron, en kiu ni prepariĝu por naturaj katastrofoj, sed ni bezonas memori, ke problemoj, kiujn la regionoj kun grava ekstrakta ekonomia aktiveco travivas, estas produkto de tutmonda klimata krizo. Tial, la sola vojo por prepari nin kontraŭ novaj arbarbrulegoj estas lukti por mondo, kiu konsideros la klimatsanĝiĝon kiel gravan krizon.

Ĉiel, eĉ se la situacio en la sudo de Ĉilio estas kruela, tutlanda kaj internacia helpoj, kiujn la viktimoj ricevis, montris al la mondo, kiel grava estas kunlaborado. En Ĉilio multaj kolekto-centroj estis instalitaj en la plej grandaj urboj por disponigi vestojn, manĝaĵojn kaj higienajn utilaĵojn. En la internacia komunumo, Ĉilio akceptis helpo de fajrobrigadanoj el Kolombio, Argentino, Hispanio, Meksiko kaj Venezuelo.

Kiel esperantistoj ni devas valorigi la internacian fratecon kaj esperi, ke tiu sama frateco povas helpi al la lukto kontraŭ multaj naturaj katastrofoj, kiuj okazas en la tuta mondo sekve de la klimatsanĝiĝo. ■

NATURFENOMENOJ

Ĉu la plej granda akvofalo estas submara?



Juan Carlos **MONTERO MEDINA**
korespondanto de MONATO en Kubo

Akvofaloj en la mondo varias laŭ alteco kaj akvovolumeno. La plimulto troviĝas sur la surfaco de la tero. Tamen, tiu, kiun oni taksas la plej granda, kaŝas sin suboceanne. Sciencistoj esploras tiun ĉi geografian fenomenon ekde 1995 kaj opinias, ke la imponega katarakto ludas bazan rolon por la stabileco de la tutmonda klimatsistemo.

Tiu giganta katarakto situas ĝuste sub la Dania Markolo, kiu malgraŭ sia nomo situas inter Gronlando kaj Islando, ligante la Gronlandan Maron kun Atlantiko. Ĝi estas trioble pli alta ol akvofalo Angel (Salto Angel, sud-oriente en Venezuelo), la plej alta surtera akvofalo. Ĝi komenciĝas proksimume 600 metrojn profunde,

estas entute 3,5 kilometrojn alta, dum ĝia larĝo atingas 160 kilometrojn. Kvin milionoj da kubaj metroj da akvo malsupreniras ĉiusekunde, kompare kun la 2407 kubaj metroj de la niagara akvofalo.

Kiel povas akvofalo esti submara?

En la loko, kie troviĝas tiu katarakto kunfluas du akvo-fluoj de malsamaj temperaturoj: la glaciaj akvoj el la Gronlanda Maro, devenantaj el la Arkta Oceano, kaj la pli varmaj akvoj el la Irmingera Maro, kies origino estas Atlantiko. Sekve, la malvarmega akvo estas pli densa ol la pli varma akvo, kio igas ĝin formi akvofluon kiu malsupreniĝas tra tiu ĉi speco de submara muro, plonĝe sekvan la deklivon de la suboceanne tero ĝisfunde. ■



Tiu giganta katarakto situas ĝuste sub la Dania Markolo, kiu malgraŭ sia nomo situas inter Gronlando kaj Islando.

NATURO

Fascino de etaj insuloj



Garbhan **MacAoidh**
korespondanto de MONATO en Irlando

Mallongan parton de mia vivo mi pasigis kun mia edzino kaj du filoj sur unu el la malpli grandaj loĝataj insuloj de Skotlando. Etaj izolitaj insuletoj, ie ajn en la mondo, ĉiam fascinis kaj allogis min. Plurfoje, mi vizitis diversajn insulojn de Portugalio, Italio, Kroatio kaj Irlando, sed por mi la plej interesaj estas la pli foraj, la ne tiom facile atingeblaj.

La skotlandaj insuloj

Skotlando posedas pli ol 790 marajn insulojn, el kiuj la plimulto troviĝas en kvar ĉefaj grupoj, nome la insularoj Ŝetlandoj, Orkadoj kaj Hebridoj. La lasta dividiĝas en du grupojn, la Internaj Hebridoj kaj la Eksteraj. Cetero, estas amasoj da insuloj en la estuaroj Clyde [klajd], Forth [forf] kaj Solway [solŭej], sen mencii la abundajn enlandajn lagajn insuletojn. La plej suda mara

insulo estas Creag Ealasaid (angle: Ailsa Craig), je ĉirkaŭ 16 kilometroj for de la ĉeftero. Ĝi estas, fakte, apenaŭ insulo, sed nur alta roko kun areo de ĉirkaŭ 1 kvadrata kilometro. Tamen, en la 20a jarcento tie loĝis anoj de familia branĉo de mia patrino (nome, la Girvan-familio, origina de la samnoma urbo Girvan, gaele Inbhir Gharbhain), kies solaj najbaroj estis la gardisto de la roka lumturo kaj lia familio (Thomson).

Dokumento verkita en 1549 pri la Hebridoj inkluzivas la rokon kiel unu el tiuj insuloj, sed ĝi situas tre for de tiu insularo. Hodiaŭ Creag Ealasaid estas ne-loĝata.

Nur en la Hebridoj, ĉe la okcidenta marbordo, troviĝas proksimume 550 insuloj, el kiuj 64 estis loĝataj en la jaro 1973. De tiam malkreskis la loĝantaro sur kelkaj, dum en aliaj (precipe sur la pli grandaj insuloj) ĝi iom kreskis. Oni

konstatas, ke tiuj, kiuj devis forlasi sian hejman insulon kutime sentas profundan nostalgion, malgraŭ la fakto, ke la vivo sur malgranda insulo ofte estas malfacila, sol-eca kaj malriĉa, kaj la insula klimato ofte estas malmilda kaj ŝtorma. Tamen, sunaj someroj kaj belega tera kaj mara pejzaĝo ĝenerale plene kompensas tiajn malavantaĝojn.

Antikvaj loĝantoj


En la pasinteco multaj malgrandaj insuloj, kiuj hodiaŭ estas ne-loĝataj, havis daŭran loĝantaron. En la 19a jarcento pluraj familioj loĝis sur hebridaj insuloj kiel Pabaigh kaj Fuaigh Mòr, sed la loĝantoj estis perforte elpelitaj de avaraj posedantoj, io okazinta en preskaŭ la tuta norda Skotlando. En la jaro 1755 la altejaj kaj insulaj regionoj enhavis 20 % el la loĝantaro, sed en 1961 la kvanto falis ĝis 5 %.

Aliaj insuloj iam loĝataj, sed hodiaŭ ne plu, inkluzivas la etajn Miughalaigh, Nos, kaj la insularon Hiort (angle: St. Kilda), kiuj estis forlasitaj en la 20a jarcento. La plej drasta demografia malkresko koncernas la plej forajn kaj izolitajn insulojn kaj insularojn.

Hiort

La eta insulo Hiort situas en la Atlantika Oceano, 64 kilometrojn for de la simile malproksima (sed pli atingebla) insulego Leòdhas. Al ĝi mankas natura haveno. Do, la vojaĝo de Hiort al aliaj insuloj, aŭ de la ĉeftero al Hiort, estas ege danĝera.

La historio pri la fino de la eta komunumo en Hiort estas aparte malĝojiga. Dum pli ol mil jaroj, tiu insulo – la due plej fora el la Hebridoj – estis loĝata de fortaj kaj kuraĝaj homoj, kiuj nutris sin precipe per marbirdoj kaj ties ovojn,



ROBERT MCCRISTALL / SHUTTERSTOCK.COM

kiujn ili kolektis pendante ĉe la altegaj kaj danĝeraj klifoj. La kultivado de greno kaj terpomoj estis malfacila kaj necerta, sed la bestara grego kaj la ŝafaro, kvankam ne grandaj, estis bonaj. Vizitantoj laŭdis la kvaliton de la tiea bovina lakto. Krom en tre severaj veteraj kondiĉoj, la insulanoj havis sufiĉon por manĝi, kaj ili estis sanaj kaj kontentaj. Tamen, kontraŭ la deziroj de la loĝantoj de Hiort, la skota burokrata fako respondecas pri la insuloj decidis evakui la tutan loĝantaron, kaj en la jaro 1930 ili estis devigataj por ĉiam forlasi sian antikvan hejmon. Kun la morto de la insula komunumo mortis ĝia kulturo, la riĉa dialekto de la gaela lingvo kaj ĝiaj tradicioj. De tiam, la „vivo kaj morto de Hiort” iĝis temo de libroj kaj poemoj en la gaela kaj la angla lingvoj.

En la jaroj post nia propra restado en la norda insuleto, kie mia edzino estis

la lernejestrino, ni loĝis dumtempe en la kamparo sude de la nord-orienta urbeo Aberdeen [aberdin – prononcata kun forta kartava „rr”, ne laŭ la sud-angla prononco!]. Dum konversacio kun la pastoro de la loka paroĥo li menciis, ke li estis unu el la lastaj infanoj, kiuj loĝis sur Hiort, kaj lia patro estis la lasta tie deĵoranta misiisto de la Eklezio de Skotlando. La komunumo estis tro malgranda por havi sian propran ordinitan klerikon.

Fora insulo

Je la pli norda ekstremo de la okcidentaj insuloj troviĝas la insuleto Rònaigh-a-Tuath (angle: North Rona), kiu troviĝas en la malmilda Atlantiko ĉirkaŭ 76 kilometrojn for de la norda kabo Leòdhas (angle: Lewis), la plej granda hebrida insulo. Rònaigh-a-Tuath estas apenaŭ atingebla, krom en aparte trankvilaj veteraj kondiĉoj.

Ĝi estas la plej fora iam loĝata insulo en Skotlando, kaj la hebrida insulo plej proksima al la feroa insularo. Ĝi havas areon de 1,09 kvadrataj kilometroj. Malgraŭ sia malgrandeco, Rònaigh estis iam loĝata. Supozeble en la oka jarcento ĝi estis loĝejo de la kelta ermito Ronan, kies oratorio ankoraŭ videblas en la insulo. En la 17a jarcento ĝin okupis gaelaj ŝafistoj kaj iliaj familioj. En 1745 restis naŭ personoj en la insulo. La lasta familio tie loĝanta, estis tiu de la ŝafisto Donald MacLeod, kromnomita „La reĝo de Rona”. Li reiris al Leodhas en la jaro 1844. En tiu sama jaro du viroj de Leòdhas kverelis kun la pastoro de la preĝejo, kaj ili iris loĝi sur Rònaigh, sed en 1885, oni trovis la kadavrojn de ambaŭ. Nun la insulo estas neloĝata.

Insula (mal)progreso

Ĝis nun, neniu brita registaro sufiĉe faris por subteni la

ekonomion, infrastrukturon, komunikadojn kaj kulturon de la insuloj kaj la altejaj regionoj de Skotlando. Kvankam ili estas unu el la plej belaj „sovaĝejoj” de la nord-okcidenta parto de Eŭropo, ili estas ankaŭ unu el la plej maldense loĝataj.

Ni, kiuj nun loĝas en la Irlanda Respubliko, post familia vojaĝo ĵus revenis de Donegal (gaela Dún na nGall), regiono en la nord-okcidenta parto de Irlando, kiu estas imposte simila al la skota altejo. Ni pasigis kelkajn tagojn en la insuleto Cruit. Malgranda loka komunumo de denaskaj insulanoj ankoraŭ loĝas tie, sed la plimulto el la domoj en la insulo kaj en la apuda ĉeftero nur en somero estas okupata de turistoj. Laŭŝajne, en la moderna mondo ne restas loko por tiaj antikvaj tradiciaj komunumoj. ■

OPINIO

La hispana en Ameriko: apartaĵoj, unikeco, identeco



Leonardo Araya
korespondanto de MONATO en Ĉilio

Esperantistoj scias multon pri la maniero, kiel lingvo povas konstrui rilatojn de frateco kaj kunlaboro inter homoj el plej diversaj landoj, kulturoj kaj religioj. Ili povas ĝui amikecon kun aliaj homoj, kiuj parolas la saman internacian lingvon, revante, ke la eblo sin interkompreni povas eĉ krei pacon en la mondo. Sed, krom Esperanto kaj aliaj planlingvoj, kelkfoje ekzistas ankaŭ naturaj idiomoj kapablaj ligi tre diversajn landojn kaj kulturojn. Kompreneble, eblas pensi tiurilate pri la angla pro ĝia nedubinda disvastiĝo en plej diversaj landoj, tamen ĝi estas nek la ununura nek la ĉefa lingvo, kiu faras tion en la mondo.

La hispana estas unu el la ĉefaj lingvoj, kiuj interligas vastegan kulturenan regionon kaj grandan nombron da landoj. Eble, se konsideri la denaskan lingvon de homoj en la mondo, nur lingvoj kiel la araba aŭ la franca konektas tiom da landoj, kie la plejparto de homoj povas interparoli senprobleme, kiom la hispana. Ĉi-lasta estas granda elemento de identeco por homoj en Ameriko, kaj la koncepto „Hispan-Ameriko”, kiu inkluzivas tiujn naciojn de Ameriko, kie oni parolas la hispanan, ofte estas pli grava ol la koncepto „Latin-Ameriko”, kiu simple aludas la landojn, kie oni parolas latinidajn lingvojn (ne nur la hispanan, do, sed ankaŭ la portugalan aŭ la francan).

Estas impresa sperto povi vojaĝi al aliaj amerikaj landoj kaj povi interkomunikiĝi senprobleme kun hispan-amerikanoj, komprenante multajn aspektojn de iliaj vivoj. Hispan-amerikanoj uzas plejparte la samajn vortojn, kaj, eĉ kiam ili ne komprenas ian esprimon, ili povas bone kompreni tion, kion la aliuulo celis.

Ksenofobio

La hispana lingvo ankaŭ helpas migrantojn, kiam ili alvenas al aliaj hispan-amerikaj landoj: ekzemple migrantoj el Venezuelo aŭ Kolombio ricevas en Ĉilio ja pli bonan traktadon ol migrantoj el Haitio, kiuj ne parolas la hispanan kaj, pro tio, ofte estas viktimoj de ekspluatado fare de ĉilianoj, kiuj bezonas

malmultekostajn laborantojn. Fakte ekzistas granda bedaŭrinda ksenofobio en Ĉilio. Tiu hispan-amerika identeco aperas ankaŭ en la momento, en kiu oni spektas la samajn filmojn, dublitajn al tiel nomata „neŭtrala hispana” aŭ al la „latina hispana”, kiu apartenas al ĉiuj hispan-amerikaj landoj kaj al neniuj samtempe.

Apartaĵoj

La hispana el Hispanio havas multajn unikajn apartaĵojn: inter ili la plej grandaj estas fonetikaj kaj vortprovizaj. Ekzemple, en regionoj de Hispanio kiel Kastilio la hispana litero *z* estas prononcata kiel la litero *θ*, de la internacia fonetika alfabeto (samkiel en la anglaj vortoj *think*, *thanks*, *path*), sed en la tuta

hispan-amerika regiono ĝi estas prononcata kiel la litero *s* de la esperanta alfabeto. Aldone, en Hispanio homoj uzas la duan personan pronomon pluralan *vosotros*, dum en Ameriko oni uzas *ustedes*. En landoj kiel Ĉilio oni ofte eĉ uzas por singularo la pronomon *vos* anstataŭ la tipan *tú*.

Aliaj diferencoj estas plejparte ligitaj al la influo de amerikaj indiĝenaj lingvoj sur la amerika hispana. Ĉiu lando havas specifajn vortojn: ekzemple, en Ĉilio oni nomas ge-koramikojn *pololos*, laŭ vorto indikanta la endemian koleopteron *Astylus trifasciatus*, pro la maniero, kiel ili flugas unu ĉirkaŭ la alia. Fonetike oni en Hispan-Ameriko ankaŭ aliigas iujn sonojn: ofte oni ne prononcas la literon *s* inter aliaj literoj, do ĉiliaj esperantistoj devas ekzemple zorgi por diri „Esperanto” anstataŭ „Ehperanto”.

La ĉilia hispana estas aldone tre aparta, kaj en Ĉilio la plejparto de la loĝantaro parolas tre simile, sen rimarkindaj regionaj variadoj. Ĉi tiu situacio estas tre malsimila al tiu en Hispanio, kie diversaj regionoj havas, krom la hispanan, eĉ siajn proprajn lokajn lingvojn: la katalunan, la galegan, la eŭskan.

Ortografia reformo

La stabila ortografio de la hispana, danke al pria agado de la Reĝa Akademio hispana, helpas komunikiĝi,

”

En 1843 en Ĉilio komenciĝis klopodo pri reformo de la hispana ortografio, lanĉita per verko de Andrés Bello, venezuela enmigrinto, kiu fondis la Universitaton de Ĉilio

ĉar nun, por la skribata lingvo, ekzistas ununura oficiala hispana ortografio, kaj ĉiuj hispane parolantaj nacioj estas devigataj uzi ĝin. Tamen ne ĉiam estis tiel, kaj Ĉilio estas bona ekzemplo de alternativa hispana ortografio. En 1843 en Ĉilio komenciĝis klopodo pri reformo de la hispana ortografio, lanĉita per verko de Andrés Bello, venezuela enmigrinto, kiu fondis la Universitaton de Ĉilio. Tial oni delasis en Ĉilio la regulojn el Hispanio, kaj la lando konservis tiun reformon ĝis 1927, kiam la ĉilia registaro decidis akcepti la regulojn de la lingva akademio kaj forlasi la reformon de Bello. Lia reformo konsistis el ŝanĝoj, kiuj celis igi la hispanan ortografion pli simila al la efektiva elparolo de la lingvo: pro tio, ĝi transformis la manieron skribi kelkajn

literojn, kiuj ne kongruis kun la respektivaj sonoj. Ekzemple, la reformo tute eliminis la silentan literon *h*, kaj proponis, ke oni skribu *ks* anstataŭ *x*, kiel okazas en Esperanto. La reformo celis pligrandigi la alfabetigon de la lando, kaj ĝi estis adoptita ankaŭ en aliaj landoj, sed Hispanio rifuzis ĝin, do la sola akceptata ortografio hodiaŭ estas tiu, kiu observas etimologion pli ol efektivan elparolon.

Spite al tio, ke la reformo de Bello ne venkis, la hispana hodiaŭ estas bona ilo por interkomunikiĝi kaj por kompreni homojn el multaj landoj. Kvankam antaŭvidi la estontecon de la hispana kaj de la hispaneco estas malfacile, vere esperindas, ke ĝi daŭros esti frateca elemento de unueco kaj ligiteco inter la kulturoj de vasta regiono. ■

La KancerKliniko

Politika Kultura Skandalema Ajnista
4 numeroj jare + La Krom

lkk@free.fr

Regulaj kunlaborantoj: Serge Sire, Ionel Onet, Mikaelo Bronŝtejn, Laŭrenco Septier, Mao Zifu, Jopetro Danvy, Gennadij Turkov, Russ Williams, Stéphan Brault, Ŝarlerik d'Arroi, Ĵak Le Puil, Lilia Ledon, N. Xil Carvalho, Robert Molimard, Claude Gerlat, Trevor Steele, Ian Fantom ktp.

Abono: 27,50 € (ekde 16 en kelkaj landoj)
Jacques Le Puil, pĉk 12 729 73 X Paris
aŭ ĉe FEL, UEA, Esperanto-USA, ktp



Jen antologia omaĝo!

Fernando PITA

Antaŭ ol komenci tiun recenzon, mi devas konfesi, ke mi amegas kaj la hispanan lingvon kaj la hispanlingvajn literaturojn, kiujn mi studas kaj ĝuas de pli ol 30 jaroj, kaj ke mi eĉ instruis ambaŭ en la bonaj tempoj, kiam mia lando pensis pri latin-amerika integriĝo, anstataŭ la hodiaŭa flatado al Usono. Tiel, kiam la redakcio de MONATO anoncis, ke libro nomata *Omaĝe al Lorca* estas disponebla por recenzo, mi fulmrapide konigis mian tujan pretecon plenumi tiun taskon, ĉar mi avide volis scii, ĉu la antologio estas digna je la omaĝita aŭtoro aŭ ĉu ĝi – kiel mi jam vidis ie – estas por li kvazaŭ ia nova murdo.

Plej elstara

Ne-hispanlingvano eble ne scias, ke Federico García Lorca estas la plej elstara hispana poeto de la 20a jarcento (kaj, sen ajna troigo, la plej elstara el tiuj naskiĝintaj post la 18a jarcento): la poeto, kiu lerte scipovis renovigi la hispanan poezion per kunligado de popolaj

tradicioj al avangardeco, kaj kiu, kune kun la ĉiliano Pablo Neruda, simbolas la hispanlingvan poezion de la lastaj 120 jaroj.

Li estis ankaŭ dramisto, kies preskaŭ ĉiuj verkoj estas surscenigitaj ĉu en teatro, ĉu en plej diversaj filmoj en diversaj landoj (ne nur hispanaj). Liaj poemoj estas muzikigitaj en diversaj lingvoj, de la angla ĝis la hebrea. Pri li oni jam verkis multajn librojn, studojn, dramojn ktp. Tamen, pli ol ĉio ĵus menciita, la verkaro de Lorca estas ne nur vera, profunda kaj eĉ kortuŝa plonĝado en la hispana kulturo, sed ankaŭ la plej trafa ŝlosilo, por ke oni plene komprenu ĝin – kaj temas ne nur pri tiu de la 20a jarcento.

Malfacila esperantigo

Antaŭ la graveco de tiu poeto, ni estu sinceraj: tiel, kiel neniu kantisto, eĉ se absurde genia, devas provi kanti ion el Frank Sinatra aŭ el Charles Aznavour, se li ne estas ĝisoste konvinkita, ke li plene sukcesos ravi la geaŭskultantaron, ĉar kontraŭe, tiu ago certe ne restos senpuna; sammaniere

”

La tradukoj de Fernández estas ne nur bonegaj, sed prezentas ĝuste tion, kion mi taksis la plej malfacila ero en la esperantigo de Lorca: Fernández lerte, sed rigide, obeis al la ritmo kaj la sentemo de la originaloj

”

Fernández devis plenigisian libron per abundo da notoj kaj klarigoj, kiuj estas utilaj ne nur al la leganto, sed ankaŭ por alilandaj universitataj profesoroj

neniu devas misuzi la mitan nomon de Lorca. Tial, kaj jen nova konfeso: dekomence mi atendis eltrovi en tradukado de liaj poemoj, diversajn stumblojn de la tradukinto, pri kiu mi tuj diru: mi vere ŝatas la poemojn de Miguel Fernández, unu el plej elstaraj niaj nunaj poetoj. Ĉar la amara fakto estas: esti bona poeto ne nepre garantias, ke oni estu ankaŭ bona tradukisto de poezio.

Tamen mi feliĉas diri, ke ĉi-foje mi komplete eraris: la tradukoj de Fernández – kiujn mi legis kun la originala verkaro de Lorca ĉemane – estas ne nur bonegaj, sed prezentas ĝuste tion, kion mi taksis la plej malfacila ero en la esperantigo de Lorca: Fernández lerte, sed rigide, obeis al la ritmo kaj la sentemo de la originaloj. Kompreneble, por tiel agi, Fernández devis skermi per ĉiaj lingvaj ebloj por esprimi, je ties ĝusta nivelo, la riĉecon de la vervo de Lorca.

Kaj li tion faris sen uzo de la ruza strategio de kelkaj tradukistoj: elekti la plej „simplan” verkon de iu ĝene-

rale altnivela aŭtoro kaj esti por ĉiam laŭdata kiel „tradukinto de tre kompleksa verkisto”. Ne! Eĉ se Fernández estus pensinta pri tio, li tute fiaskus, ĉar ne ekzistas „simpla teksto” de tiom fekunda poeto kaj dramisto kiel Lorca, kaj tion elmontras la ampleksa, lerta kaj aku(ra)ta elekto de la prezentitaj tekstoj.

Tiu elekto alportis al Fernández demandon pli gravan ol la tradukado mem: kiel klarigi al ĝenerala legantaro – eĉ se hispanlingvana – la fantastajn, fantaziajn kaj neatendebajn poeziajn bildojn kaj metaforojn, kiuj svarmis en la poemoj kaj dialogoj? Kiel permesi, ke la leganto ilin komprenu, sen ke tiuj fariĝu seneliraj kaprompiloj? Ĉi-okaze ne estis alia rimedo: Fernández devis plenigi sian libron per abundo da notoj kaj klarigoj, kiuj estas utilaj ne nur al la leganto, sed ankaŭ por alilandaj universitataj profesoroj, kiuj ie ajn devos instrui la poezion de Lorca (bedaŭrinde, tiu libro ne estis eldonita, kiam mi instruis tiun kurson ...). Tiuj notoj ja prezentas al ni diversajn interpretilojn por la poezio de García Lorca.

Eleganta enkonduko


Kaj, se nun oni parolas pri prezentado, mi ne rajtas ne mencii la elegantan (por minimume diri) enkondukon, faritan de alia amanto de la hispana kaj hispanlingvaj literaturoj, iu profesoro Duncan Charters. Kompreneble, enkonduko verkita de la prezidanto de UEA estas bona vizitkarto, sed estas alia granda nomo en la libro; nomo, kiu estas neniel neglektenda – kaj kies ĉeesto estas kvazaŭ sekreta omaĝo: Fernando de Diego, kiu subskribas diversajn el la prezentitaj studoj/komentarioj pri Lorca kaj ankaŭ kelkajn el la tradukoj enirintaj en tiun volumon, kiu tiamaniere fariĝas antologio ne nur pri la omaĝito, sed ankaŭ mapo, per kiu oni reprezentas la vojon de García Lorca en Esperanto.

Kaj fine, neatendite *Omaĝe al Lorca* fariĝas modelo por novaj kompil-libroj, ĉar certe estas en Esperanto aŭtoroj jam diversfoje kaj dise tradukitaj, sed kies verkoj neniam estis prezentitaj en unuvoluma teksto. Ke novaj „Omaĝe al ...” aperu ĉe ni! ■



La libroj kaj diskoj recenzitaj en MONATO estas mendeblaj de la Retbutiko de FEL

Lange Beeldekenstraat 169,
B-2060 Antwerpen, Belgio.
tlf. + 32 3 234 34 00
rete: retbutiko@retbutiko.be
skajpe fel-monato
www.retbutiko.be



Miguel Fernández (komp.):
Omaĝe al Lorca. Antologio de poemoj de (kaj de verkoj pri) Federico García Lorca.
Hispana Esperanto-Federacio, Madrido,
2021. 304 paĝoj.
ISBN 978-84-09-33633-3.

Petro Desmet'

Lerni e-legante

ŝtupoj al pli vasta vortprovizo



Kiamaniere lingvolernanto povas plivastigi sian vorttrezoron? Per legado de libroj! Tamen, tro mal-facilaj romanoj povas malkuraĝigi la legadon, tro facilaj ne lernigas multajn novajn vortojn. Tial ĉi, kreiĝis “Lerni e-legante”: legolibro kiu abunde alportas novajn vortojn laŭ natura maniero, en kunteksto, kun subteno de multaj ilustraĵoj por helpi la komprenon.